


EL POPOLA ĈINIO

中國報

10
2000

ISSN 0032 - 4361



Renkontiĝo en Hongkong
Agronomia urbo en okcidenta Ĉinio
Sindediĉo al aferoj por maljunuloj

★ POPOLA ĈINIO



Raportoj
pri la
56-a IJK **14**



Raportoj pri
la okcidenta
Hubei-pro-
vinco (II) **32**



20



Geedziĝo

Neĝmonto
Yulong **25**



29

Vestoj de
ĝingpo-oj



3 INTER NI

4 52 amleteroj

6 ĈINAJ E-ISTOJ:

Mi estas obstina esperantisto; Li Dugong kaj lia "fiŝvilaĝo"

8 SUR NIA LIBROBRETO:

Esperantiĝis la dramo "Fulmotondro"

10 50 JAROJ — EPĈ:

Konfeso de E-veteranino; Elito kaj elituloj; Ha lo, geamikoj!

13 Grava anonco

13 KORESPONDI DEZIRAS

24 ESP-NOVAĴOJ

28 KURANTAJ AFEROJ

36 Sindediĉo al aferoj por maljunuloj

38 Agronomia urbo en okcidenta Ĉinio

41 ĈINA KULTURO:

La historio de ŝuoj de Ĉinio (I)

43 Vere modela fil' homara!

44 EL ĈINAJ GAZETOJ

46 MULTNACIA ĈINIO:

Derungoj en profunda montaro

48 La lasta milita elefanto (Novelo)

50 POR KOMENCANTOJ:

Aŭtuna mateno

51 ĈINAJ METIARTAĴOJ:


Aprecado de umefloroj

INTER NI

La 56-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto okazis aŭguste en Hongkong. Tio alportis verdecon al la urbo, kies E-movado estas ne tiom vigla. Ni esperas, ke la kongreso instigos junajn e-istojn pli diligente lerni nian lingvon. Pri la kongreso bonvolu legi artikolojn de niaj raportistoj. En ĉi numero estas "La historio de ŝuoj", "Derungoj en profunda montaro" kaj "Geedziĝo", kiuj konigas al vi la ĉinan moron kaj tradician kulturon. "La historio de ŝuoj" pritraktas, ke ŝanĝiĝo de ŝuoj estas ofta kiel tiu de vestoj, kaj tiu ŝanĝiĝo rilatas al ideologio kaj vivmaniero de homoj. "Geedziĝo" prezentas originalan moron de Shandong-provinco. La geedziĝaj moroj de diversaj lokoj diferencas pro malsameco de naciecoj, historioj kaj cirkonstancoj.

"52 amleteroj" temas pri kortuŝa rakonto pri vicurbestrino grave vundita de incendio.

La Red.



"Tianshan-aj knabinoj"
Foto de Liu Qijun

Jen sceno de la vespero "Tianshan-aj knabinoj" kune prezentita de elstaraj artistoj el kelkaj ensembloj de Xinjiang. La vespero konsistanta el originalaj programeroj en naciminoritata gusto ĝuigis al la spektantoj belajn kantojn kaj dancojn.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

10[505]2000

52 amleteroj

En la tagoj, kiam ili ne povis intervidiĝi, la edzo, starante sub poplo ekster la fenestro de la hospitalo, foje-refoje vokis la nomon de la edzino kaj foje-refoje verŝis siajn amon, prizorgon kaj kuraĝigon en la amleterojn, kiujn la edzino ricevis kune kun la matenmanĝo.

de HONG LEI

TIUN tagon, kiam Lanxiu denove aperis antaŭ siaj kolegoj, ili ĉiuj mire kaj ĝoje ŝin ĉirkaŭis: "Lanxiu, vi finfine venkis vin mem!"

La virino, kiu nomiĝas Lanxiu, estas vicurbestro de Karamay, petrola urbo en Xinjiang, okcidenta Ĉinio. Ŝi travivis tie katastrofan incendion.

RIDETANTA VIZAĜO EN KANDELLUMO

Sur foto Lanxiu estas beleta kun nigraj haroj kaj dolĉa rideto; ŝia edzo Yu Jianzhong kun profunda amo fiksas sian rigardon sur ŝi. Ekde la universitata vivo ili kunestas pli ol 30 jarojn.

Tio estis bela vespermanĝo por naskiĝtago. Kiam tintis vintaso, la okuloj de Lanxiu pleniĝis de larmoj. Tiam ŝi, kiu laboris kiel vicurbestro dum sinsekvaj tri servoperiodoj, havis nur unu deziron esti bona edzino kaj amoplena patrino post la servoperiodo.

Ŝia edzo, kiel ĝenerala direktoro de la Petrolkonduka Kompanio de la Xinjiang-a Petrola Administrejo, respondecas pri pli ol 1400-kilometraj petrolkondukaj tuboj. Ankaŭ li estas tre okupita de la laboro. Kiel edzo li bone komprenas la amon de la edzino



Lanxiu kaj ŝia edzo

al la familio.

Sed ilia feliĉo kruele disrompiĝis en terura incendio kelkajn tagojn poste.

Tiun tagon okazis aktivado, kies ĉeestantoj plejparte estis elementlernejoj. Subite ekbrulis la kurteno apud kurentfonto. Tiam Lanxiu sidis en la unua vico, proksime al la fajro kaj elirejo. Multaj homoj teruritaj torentis eksteren, sed ŝi aplombe ordonis malŝalti la kurentfonton kaj fari alarmon. Poste ŝi sin pafis sur la scenejon kaj savis la infanojn unu post alia el la fajro, ĝis ŝi falis svene...

Kiam ŝi rekonsciiĝis, ŝajnis

al ŝi, ke ŝi venis el infero. Ŝiaj manoj similis al fandiĝanta vaskandelo. 90% de ŝia vizaĝo estis karbigitaj de la fajro; ŝiaj buŝo kaj nazo kvazaŭ kunfandiĝis; nur ŝiaj okuloj restis senvundaj dank' al la okulvitroj. Iu junulo kliniĝis al ŝi kaj demandis: "Ĉu vi estas urbestro Lanxiu?" Ŝi pene kaptis kaj diris per malklara voĉo: "Tuj... savu la infanojn!" Post tio ŝi denove svenis.

En la sekvanta tago ŝia edzo oficvojaĝanta en alia loko hastis al Karamay. En la hospitalo li vidis sian edzinon en lito kun gorgo tranĉita. Forte kaptante la litkapon, li larmis kaj foje-refoje diris:

“Brava vi estas, Lanxiu. Vi estis portita el la fajro! Vi nepre eltenu!”

52 TAGOJ KAJ NOKTOJ

La fenestro de la asepsa ĉambro de la departemento por brulvunditoj en la tria etaĝo de la Ĝenerala Hospitalo en Karamay disigis la geedzojn 52 tagojn kaj noktojn. Ili ne povis intervidiĝi, kvankam ili estis tute proksime unu al la alia.

Ene Lanxiu luktis kontraŭ la morto: Povis okazi, ke ŝi ne plu reakiros la konscion post plurfoja svenado pro dolorego. Kelkfoje ŝi sentis, ke ŝia svaga vivo vagas en malluma dezerto al malproksimo, kaj tiam ŝi kvazaŭ aŭdis sur monto kaj ĉe bivakfajro la krion de la edzo: “Lanxiu, mi estas ĉi tie!” Reakirinte la konscion, ŝi vere aŭdis la voĉon de la edzo: “Lanxiu, mi estas ĉi tie!” Lia voĉo venis de la unua etaĝo de la domo.

En la tagoj, kiam ili ne povis intervidiĝi, la edzo, starante sub poplo ekster la fenestro de la hospitalo kaj en temperaturo de pli ol 30°C sub la nulo, foje-refoje svingis la manon al la fenestro kaj foje-refoje vokis la nomon de la edzino. Ĉiutage li mem preparis manĝon, portis ĝin al la hospitalo kaj konfidis ĝin al flegistino. Timante, ke la edzino ne povos elteni la atakon de kriplico, li foje-refoje verŝis siajn amon, prizorgon kaj kuraĝigon en la amleterojn, kiujn la edzino ricevis kune kun la matenmanĝo.

“Lanxiu, brava vi estas, mia fiero vi estas, kaj vi nepre eltenu ĉiajn suferojn!”

“Lanxiu, de tre tre longe mi volas esprimi al vi mian sinceran amon, tamen mi estas sinĝena peti flegistinon legi por vi miajn leterojn, krome, mi timas, ke vi larmos kaj tio malhelpos al la vundoj resaniĝi. Mi atendas vian resaniĝon... Mi amas vin, elkore!”

“Mia kara, mi deziras, ke vi baldaŭ resaniĝu kaj renkontiĝu kun ni hejme. Tiam mi certe

atenteme banos vin, kiel vi diris, forigos la malnovan haŭton kaj aperigos la novan, vivoplenan...”

“Mia Lanxiu, hodiaŭ mi vizitis kelkajn suferintojn de brulvundo. Post plastio ne videblas la vundoj...”

Lanxiu kuŝis en la hospitalo tri monatojn kaj en asepsa ĉambro 52 tagojn, kaj ŝia edzo skribis al ŝi 52 amleterojn. Oni diris, ke la edzo subtenis Lanxiu. Sed la edzo diris: “Estis Lanxiu, kiu subtenis min! Ŝiaj senegoismo kaj braveco multe inspiris min. Tial, mi devas subteni ŝin per mia vireco, ke ŝi ne plu suferu ian ajn turmenton.”

POR REVEKI ŜIAN VIV-ESPERON

En la tago, kiam Lanxiu elhospitaliĝis, la edzo kaj infano purigis la domon kaj preparis abundan manĝon kvazaŭ por honora gasto, sed ili ne povis kaŝi ĉiujn spegulojn en la hejmo.

En aŭto veturanta al la hejmo la edzo, brakumante la edzinon, murmuris al ŝi: “Certe vi resaniĝos. Iuj brulvundiĝis pli grave ol vi kaj resaniĝis 2-3 jarojn poste. Lanxiu, ni kune vivis pli ol 30 jarojn kaj ni vivos pliajn dekojn da jaroj. Mi estas fidoplena. Mia Lanxiu estas firmvola.”

Lanxiu komprenis la edzon. Enirante en la hejmon, ŝi kvietigis sin, surmetis pantoflojn, trinkis akvon... Fine ŝi venis antaŭ la spegulon. “Ho! Ĉu estas mi?” La mentono kaj la kolo kunigis, la buŝo kaj la naztruoj misformiĝis... En la spegulo ŝi vidis sin multe pli terura ol ŝi imagis. “Tiu momenton mi deprimiĝis sur la lito, kaj larmoj torentis el la okuloj. La edzo sidiĝis apud mi kaj forte brakumis min sen parolo. Iom post iom mi kvietigis...” Kiam Lanxiu menciis la momenton, kiam ŝi revenis hejmen el la hospitalo, ŝia koro ankoraŭ tremis.

En la lastaj jaroj por reakiri sian korpan funkcion Lanxiu ak-

ceptis plurajn operaciojn kaj samtempe ricevis plastion de la vizaĝo, tamen la atendita efiko ne okazis.

Iutage, iu sinjorino de la Ĉina Asocio de Urbeŝtrinoj vizitis Lanxiu, portante al ŝi tonikojn. Antaŭ tio ŝi penadis por reveki la viv-esperon de Lanxiu. Ĉi-foje, ŝi vidis Lanxiu sin rigardi en la spegulo. Kiam Lanxiu sin turnis al ŝi, ĉi tiu vidis la du maldikajn pentritajn brovojn sur la brulvundita vizaĝo de Lanxiu. Tiumomente, ŝi ne plu povis reteni siajn larmojn, komprenante, ke Lanxiu, kiel virino, finfine venkis sin mem kaj havigis al si kuraĝon plu vivi.

SENŜANĜA AMO

Aŭguste de 1968, kiam Lanxiu kaj Yu Jianzhong diplomiĝis el la Pekina Petrola Instituto, ili sin anoncis por konstruado de la petrolo urbo Karamay en la okcidento de Ĉinio. Tiam tie etendiĝis senlima dezerto nur kun kelkaj maldikaj fragmitoj ĉe akvo. Ĝuste en tiu loko Lanxiu kaj ŝia edzo faris sian neston.

Rememorante la pasintaĵon, Lanxiu diris: “Tiam ni nur deziris liveri pli da petrolo al la patrujo kaj tiu pasio pli kaj pli ardis kiel la suno super Gobio!” Ŝia edzo sekvis: “Nia juneco plena de gajeco kaj ankaŭ de malfaciloj! Por kolekti unu ĉaron da brulligno ni devis veturi dekelkajn kilometrojn. Reveninte hejmen, ni estis tiel lacaj, ke ni ne volis manĝi.”

Je mencio pri tiuj tagoj ili emociiĝis kaj ekkantetis “Karamay”. Samtempe, kiam ili kantis tiun kanton, iliaj okuloj ekbrilis kaj el ili legiĝis profunda amo al la okcidento de Ĉinio. Dank’ al sennombraj tiaj bravaj gejunuloj, Karamay iom post iom havas lamplumon, 220 mil loĝantojn, aromajn florojn, verdajn herbojn, arbare starantajn etaĝdomojn... Pasis dekoj da jaroj, la ĉarma melodio de la kanto “Karamay” ankoraŭ ŝvebas en la aero de la okcidento de Ĉinio. ■

Mi estas obstina esperantisto

Post profunda pripensado mi senhezite forlasis mian laborpostenon en 1993 por reveni al Esperanto. Mi solvis la problemon inter vivpano kaj Esperanto.

de LI DUGONG

MI lernis Esperanton ekde 1981 pere de koresponda lernejo. Tiam E-movado en Ĉinio estis tre prospera, kaj multaj homoj lernis Esperanton. Post 1987 malaperis la alttajo, kaj multaj samideanoj forlasis Esperanton. Kvankam mi ne forlasis ĝin, tamen sentis ĉagrenon kaj perdis memfidon. De 1987 ĝis 1992 mi estis ekster E-movado. Plejparto de mia tempo kaj energio estis dediĉita al aliaj aferoj. Post profunda pripensado mi senhezite forlasis mian laborpostenon en 1993 por reveni al Esperanto. Unue mi devis vivteni min, do mi funkciigis librostandon por lukri monon. Tiam mi havis sufiĉan tempon kaj energion por lerni Esperanton. Mi solvis la problemon inter vivpano kaj Esperanto.

En 1995 mi stariĝis "fiŝvilaĝon" kun iu fiŝisto por profiti por nia E-asocio. Bedaŭrinde mi malsukcesis en tio, tamen mi ne perdis la volon.

Ĉiutage mi dediĉas tri horojn


al la lernado de Esperanto. Mi ŝatas verki novelojn en Esperanto. Mi verkis jam kelkdek novelojn. Mi ŝatas ankaŭ vojaĝi per biciklo. Tiamaniere mi jam vizitis kelkajn esperantistojn en Sichuan-provinco, kie mi vivas.

taŭe ankaŭ mi tiel opiniis. Nun mi konsciis, ke fakte ili ne havas veran kapablon. Ili povas nur paroli papage, eĉ balbute Esperanton. Ili subtaksis Esperanton.

Mi opinias, ke bona ĉina esperantisto devas lerte uzi Esperanton kiel sian gepatran lingvon en legado, skribado, aŭdo, parolo kaj tradukado, kaj devas fari grandan penadon por tio. Memkontento kaj malpacienco estas niaj malamikoj. "Kiu ŝvitas, tiu rikoltas" estas granda vero. Ni esperantistoj devas ofte partopreni en diversaj aktivadoj. Ni devas kuraĝe paroli nian lingvon antaŭ la publiko. Ni devas persistadi en abonado de Esperantaj gazetoj kaj en aĉetado de E-libroj. Ekzemple, EPĈ estas bona instruisto de ĉinaj esperantistoj.

Mia memlernada vojo estas dorna, tamen mia volo estas ekstreme firma. Mi faris preparon spirite kontraŭ malfaciloj kaj repuŝoj. Mi ĉiam memoras la vortojn de Zamenhof: "Obstino, espero, pacienco

kaj konkordo." Mi ne troigas la fakton, ke Esperanto jam fariĝis mia spirita nutraĵo kaj ilo en mia vivo. ■



Li Dugong

Multaj esperantistoj ofte plendas, ke ili havas kapablon en Esperanto, sed tio estas senutila, tial ili forlasis Esperanton. An-

La jena artikoleto estis skribita en 1995. La aŭtoro, sinjoro Verda Dian, estas inventinto de la ĉina Esperanta ŝako. Ni raportis pri li en la 4-a numero de 1999. Lia artikoleto konigas al ni iom pli pri s-ro Li Dugong kaj lia agado por Esperanto.

La Red.

Li Dugong kaj lia “fiŝvilaĝo”

de VERDA DIAN

ANTAŬ nelonge Li Dugong kune kun iu fiŝisto starigis “fiŝvilaĝon”. Antaŭ la Printempa Festo mi vizitis ĝin laŭ lia invito. Li diris al mi: “Mi tre ĝojas, ke vi estas la dua esperantisto, kiu vizitas mian vilaĝon.” Li esperas, ke la vilaĝo estos loko por aktivado de esperantistoj.

Li Dugong memlernis Esperanton. Dank’ al sia diligenteco,

antaŭ pluraj jaroj li jam lertis en E-interpretado. Krom Esperanto, li ŝatas ankaŭ turismon. Foje li sola vojaĝis en la provincoj Yunnan, Guizhou kaj Sichuan, kaj faris mil pentraĵojn pri tieaj moroj kaj kutimoj. Iu usona amiko aĉetis unu el liaj verkaĵoj kontraŭ 20 usonaj dolaroj.

Li Dugong tre amas Esperanton. Pro Esperanto li ekŝiĝis, kaj nemalmultaj ne komprenis lin. Vidinte, ke E-aktivo ofte havas financon malfacilon, li decidis multe gajni

monon per sia propra forto por progresigi la lokan E-movadon. Por tio li elspesis sian monon ŝparitan dum plurjara vendado de libroj kaj mastrumis kune kun iu fiŝisto tiun “fiŝvilaĝon”. En ĝi funkcias te-trinkejo kaj restoracio. Tie la gastoj povas ludi ŝakon, kapti fiŝojn kaj ĝui teon kaj manĝaĵojn. Esperantistoj ĝuas senpagan regalon dum tri tagoj.

Mi esperas, ke li realigos sian deziron kaj igos la vilaĝon “familio” de esperantistoj. ■

Fraŭlino Violette Walther, vicprezidanto de la Junulara Esperantista Franca Organizo, kontaktiĝis kun la Changzhou-a E-Asocio per reto, kiam ŝi laboris en la urbo Changzhou, Jiangsu-provinco. Ŝi aktive partoprenis lokan E-aktivadon, helpis la lokan E-Asociacion en E-instruado en teknika kolegio, elementaj kaj mezgradaj lernejoj. En la ceremonio de fondiĝo de la Jiangsu-a Esperanta Centro por Infanoj okazinta en Yancheng, fraŭlino Violette Walther konigis la E-movadon en Francio kaj preparadon de la 57-a IJK okazonta en Francio venontjare. Ŝi vizitis ankaŭ Nankinon, Hangzhou kaj Zhenjiang, kaj intertempe faris interŝanĝojn kun lokaj e-istoj.

(Zhang Changsheng)

Franca samideanino en Ĉinio



Esperantiĝis la dramo “Fulmotondro”

de RIMO

FULMOTONDRO: Dramo verkita de Cao Yu, esperantigita de Liu Caisheng, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1997. Formato: 21 x 14.5 cm. 135 p. Prezo: 10.00 USD Sendokosto: 3.00 USD.

“Fulmotondro” estas majstroverko en la historio de ĉinaj dramoj. Siatempe la aŭtoro estis juna studento. Oni devas atribui la sukcesan aperon de la dramo al Bakin, nun honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. Antaŭ publikigo de la dramo Bakin jam estis verkisto, ĝuante grandan famon en Ĉinio. Li legis la manuskripton de “Fulmotondro” kaj rekomendis ĝin al la trimonata revuo “Literaturo” kaj dank’ al tio la dramo eldoniĝis en 1934. Rememorante tion, li diris: “Mi kun larmoj legis la dramon kaj unuspire tralegis ĝin. Vere, mi larmis, tamen post legado mi sentis min tre komforte kaj naskiĝis en mi sopiro kaj forto, kaj mi volas fari ion por helpi aliajn senegisme per mia forto.”

La dramo estis alte taksata de la literatura rondo tuj post sia eldoniĝo kaj post nelonge ĝi sursceniĝis en Ŝanhajo. En 1935 ĝi estis ludita trifoje en Tokio. Poste eldoniĝis ĝia japana versio.

Tiu 4-akta dramo prezentas la socion kun la familio de Zhou Puyuan, prezidanto de la direktoraro de iu karbominejo, kiel centro. Ĝi priskribas ankaŭ rilatojn inter liaj familianoj kaj kon-

fliktojn inter kapitalistoj kaj laboristoj.

La dramo prenas nur du lokojn kiel sian ejon, t.e. la salonon de la hejmo de Zhou Puyuan kaj la hejmon de Lu Gui, lia servisto.

Ĝenerale oni nomas “Fulmotondro” familia dramo. En ĝi viglas membroj de du familioj: membroj de la familio de Zhou kaj tiuj de Lu Shiping. Per elstara realisma manovro ĝi priskribas la familiajn implikaĵojn de tiuj du familioj kaj profunde montras iujn aspektojn de la tiama ĉina socio. La familio de Zhou kaj tiu de Lu estas tipaj en la ĉina socio en la 20-30-aj jaroj de la 20-a jarcento. La unua sukcese transformiĝis el la feŭda en la kapitalistan, dum la lasta formiĝis en la drasta socia ŝanĝiĝo.

Zhou Puyuan estis kapitalisto kun fortaj feŭdismaj trajtoj. Por akiri monon li faris multajn malnoblaĵojn. Li estas ekspluatema, hipokrita kaj malica. En Harbin li kontraktis pri pontokonstruado, intence detruis la digon kaj dronigis 2 200 kuliojn en furioza torento, dume li gajnis 300 juanojn el ĉiu mortinta kulio. Li kruele ekspluatis ministrojn. Ne povante toleri lian ekspluatadon, la ministroj strikis, sed li komplotis kun policistoj, subaĉetis reprezentantojn de la strikantoj kaj sufokis la strikon.

Pro sia volupta bezono, kiam li estis juna sinjoro, li perfortis junan kaj belan servistinon Lu Shiping, kiu naskis du filojn por li, sed tri tagojn post la naskiĝo



S-ro Cao Yu

de la dua filo li elpelis ŝin el la hejmo por edziĝi al riĉa fraŭlino. La unua filo estis restigita ĉe li kaj la ĵus naskita estis forportita de Shiping. Pro malespero Shiping sin ĵetis kune kun la bebo en riveron antaŭvespere de la Printempa Festo, sed estis savita. Zhou Puyuan kredis, ke ŝi mortis, kaj faris multajn afektaĵojn, ŝajne li tre karmemoris ŝin: Li diris, ke li ĉiam prenis ŝin sia leĝa edzino kaj respektis ŝiajn kutimojn. Li konservis ĉiujn meblojn ŝatatajn de ŝi por memori ŝin. Li diris, ke li volas ripari ŝian tombon. En liaj okuloj mono estas ĉiopova. Post 30 jaroj, kiam li denove renkontis Shiping, li donis al ŝi ĉekon de 5 000 juanoj, ĉar li opiniis, ke tio povas iagrade kompensi lian pekon, sed ŝi disŝiris la ĉekon. “Vi neniam estos kvita kontraŭ miaj suferoj en tiuj jaroj,” diris Shiping.

Elpelite el la hejmo de Zhou, Shiping baraktis en fremdaj lokoj kun sia infano. Por vivtenado ŝi almozis, flikadis por aliaj, laboris kiel servistino kaj faris pezan laboron en knabina lernejo por 8 juanoj ĉiumonate sub la kondiĉo viziti sian familion en ĉiu dua jaro. Por vivtenado ŝi edziniĝis dufoje kaj multe spertis malĝojon en la homa socio, tamen ŝi postvivis ĉiujn malfeliĉojn kaj kaŝis siajn malĝojon kaj larmojn. Ŝi edziniĝis al servisto Lu Gui kaj naskis filinon Lu Sifeng.

Alia figuro en la dramo estas Zhou Fanyi. Sur la scenejo ŝi estas “sinjorino kun pala vizaĝo en bela

konturo. Tamen melankolio klare vidiĝas sur ŝiaj brovoj. Malĝojo brulas interne en ŝia koro kaj la okuloj estas plenaj de doloro kaj ĉagreno pro malespero de juna virino. Ŝi estas virino klerigita per nova eduka metodo, sed influate de la malnova etiko. Ŝi amas pasie kaj malamas ĝisoste. Ŝia eksteraĵo estas kvieta kvazaŭ aŭtuna folio ĉe vesperiĝo". Antaŭ 18 jaroj Zhou Puyuan trompis ŝin per la sama metodo, kiun li uzis en traktado kun Shiping. En tiuj 18 jaroj ŝia sopiro al libereco estis sufokita, tamen ŝi kontraŭstaris al la subpremado de Zhou Puyuan, malgraŭ ke oni opiniis, ke ŝi estas malsana. Ŝi ne estas feliĉa nek virta. Ŝi deziregis la personan feliĉon, tamen deflankiĝis de la ĝusta vojo. Ŝi seksumis kun sia duonfilo Zhou Ping kaj volas fuĝi el la familio kun li.

Zhou Ping estas "28-jara viro. En liaj senbrilaj okuloj legiĝas hezitemo, malkuraĝo kaj kontraŭdiro. Li verŝajne pentas pri siaj antaŭaj eraroj. En la nova impeto de la sento fervoro kaj pasio kiel tajdo refoje englutis lin.

Lia minimuma prudento similas al velkinta branĉo turniĝanta en akvokirilo. Tial eraroj unu post alia trafas lin. Li ĉagreniĝas kaj malamas sin mem. Li envias ĉiujn senskrupulajn homojn, kiuj aŭdacas fari ĉiajn malbonaĵojn. Kaj samtempe li envias ĉiujn kapablulojn fari grandan aferon kaj fariĝi 'modela civitano'..." Li enamiĝis al Lu Sifeng, ĉar en liaj okuloj ŝi "elspiras ĉion, kion li bezonas. Ŝi estas juna, bela kaj fervora, kaj ankaŭ iom maldelikata". Li ekhavis seksan rilaton kun ŝi, sed fakte Lu Sifeng estas lia duonfratino, kion li tute ne scias.

Lu Shiping hazarde sciis, ke por laboro ŝia kara filino eniris en la hejmon de Zhou Puyuan, kaj ege maltrankviliĝis. Shiping opiniis, ke ŝia sorto mem estas destinita kaj ŝia ununura deziro estas, ke ŝia filino ne sekvu ŝian vivovojon. Tio estas spirita apogo por ŝi, tial ĉe ŝia foriro de la hejmo, ŝi atentigis la edzon neniel lasi la filinon servi en riĉula domo, ŝi diris al la filino: "Ĉu vi pensas, ke mi timas esti malriĉa kaj hontas pro nia malriĉo? Ne!

Neniom! Mi tion tute malatentas, sed ofte maltrankvilas pro via juneco kaj timas, ke vi eliros el prudento." Tial, kiam ŝi informiĝis, ke okazis la afero plej terura por ŝi, ŝi ne povis plu elteni la atakon. Ŝi veis profunde: "Ho, mia ĉielo! Kiu kulpas? Kiu faris la pekon?... Ho, mia ĉielo, se vi volas puni, do punu min solan!"

Lu Sifeng estas honesta,

vigla knabino. Ŝi elspiras juncon de socifundaj knabinoj, sed pro ŝia rilato kun Zhou Ping, ŝi estas katenita de tragika sorto, tamen ŝi ne sciis, ke la amo entenas danĝeron kaj la socio kun larĝe malfermita faŭko pretas engluti ŝin. Kiam Zhou Ping decidis sin liberigi el sia antaŭa peko, li per pli pekaj manoj kaptis sian duonfratinon Lu Sifeng. La interrilato inter Zhou Ping kaj Lu Sifeng estis ja produkto de la peka atmosfero de la familio de Zhou.

En la dramo viglas ankaŭ kelkaj aliaj figuroj:


Lu Dahai, la dua filo de Zhou Puyuan kaj Lu Shiping. En la dramo li estas ministro elspiranta bravecon kaj krudecon. Li laboras en la minejo je 300 km for de la hejmo de Zhou. Li estas reprezentanto de la ĉina laboristaro en siaj junaj jaroj kaj membro de la strik-estraro. Kun siaj kamaradoj li spontanee batalis kontraŭ ekspluatado.

Zhou Chong, filo de Zhou Puyuan kaj Zhou Fanyi, 17-jara studento. Li, naŭva kaj honesta, deziras sinceran amon. En la fino de la dramo li estis elektrofrapita, kiam li haste tiris Sifeng, kiu trafis elektrolikan draton. Kaj ili mortis kune.

Lu Gui, aĉa servisto en la hejmo de Zhou Puyuan, ĉiam kaĵolas la mastrojn por pli da profito. Li ĉiam parolas trivialajn vortojn, drinkas kaj hazardludas.

La dramo "Fulmotondro" estis ludita ne nur en teatro, sed ankaŭ en televido.

La apero de la Esperanta versio estas grava afero. Kaj al nia Esperanta biblioteko aldoniĝis nova verko, nemankigebla por la ĉina literaturo. La traduko estas klara kaj facile komprenebla. Ĝi estas taŭga legaĵo por tiuj esperantistoj, kiuj amas literaturon, sed al la libro mankas fotoj. Ĉiuj, kiuj volas koni la pasintcon de Ĉinio kaj la orientan dramon, legu la Esperantan version de "Fulmotondro".



Konfeso de Esperanto- veteranino

de JARMILA RYZNAROVA
(Ĉeĥio)

NUR du jaroj mankas al mi, ke mi ankaŭ povus diri “50 jarojn mi estas esperantistino”. Kiam mi rememoras mian komencon, kial mi en kvindekaj jaroj eklernis Esperanton, en miaj pensoj la rememoroj flugas kiel en ia filmo. Ja, kvindekaj jaroj en tiama Ĉeĥoslovakio ne estis facila periodo. Nenien okcidente ni povis vojaĝi, ni devigite lernis la rusan lingvon, ne parolante pri terura politika situacio.

Frato de mia patrino kun sia edzino post naciigo de ĉiuj eĉ malgrandaj vendejoj kaj entreprenoj fuĝis el nia respubliko, pri kio nia familio tute ne sciis. Post longa tempo nia parencino ricevis bildkarton, ke la onklo vivas en Bombajo de Hindio. La adreson ni antaŭe ne sciis. Mia kunlaborantino en oficejo montradis al mi belajn bildkartojn de la tuta mondo kaj kiam ŝi montris al mi jarlibron de UEA mi trarigardis ĝin sen troa intereso. Sed subite sur la paĝo de Hindio mi ekvidis precizajn adresojn de delegitoj en Bombajo. Mi rememoris miajn geonklojn kaj demandis, ĉu tiu delegito povus helpi trovi mian onklon, kiam mi ne povas por tio pagi lin.

“Eble oni tion povus provi” estis ŝia respondo. Tio estis impulso por mi: bonvolu trovi por mi instruiston, mi volas lerni Esperanton.

Sed la politika situacio tiutempe ankoraŭ ne estis bona kaj mi kun plua amikino regule ekvizitadis kurson — kvazaŭ de

la rusa lingvo. Sed sur la tablo sub rusa lernolibro kuŝis lernolibro de Esperanto, kaj kiam la “netaŭgaj” personoj foriris, ni lernis la internacian lingvon Esperanto.

Kun helpo de mia instruisto post du monatoj mi skribis al delegito de UEA en Bombajo kaj fakte, preskaŭ post ne tuta jaro, mi ekkorespondis kun mia onklo. Delegito, tute nekonata, neprofiteme sukcesis helpi al mi kaj poste ian tempon tradukadis leterojn de mia onklo por mi, ĉar en tiu tempo ne estis eble skribi ĉeĥe kun iu fuĝanto. La leteroj estis kontrolitaj de multaj sekretaj policistoj, sed feliĉo estis, ke en tiu tempo neniu el ili konis Esperanton.

La helpo de nekonata esperantista delegito ravis min kaj mi jam Esperanton ne forlasis. Unu el la unuaj eksterlandaj gazetoj, kiujn ni povis antaŭmendi kaj regule ricevadi, estis la gazeto “El Popola Ĉinio”. Tiutempe ni jam admiris belan kvaliton de la papero, belajn fotojn kaj tre interesajn artikolojn.

Kaj la jaroj flugis, sed hobion Esperanto mi jam ne forlasis. Estas multaj homoj, kiuj en sia junaĝo eklernas Esperanton, sed poste pro multaj familiaj malfacilaĵoj, pro multe da aliaj laboroj aŭ studado forlasis ĝin. Parto



La aŭtoro

de ili en sia maljunaĝo revenas, kiam al ili mankas ia hobia.

Poste Esperanto akompanis mian tutan vivon ĝis hodiaŭ. Mia unua edzo lernis ĝin, ankaŭ ambaŭ miaj filinoj (poste eĉ iliaj filoj). Kiam en nia familio ofte mankis mono, tamen ni sopiris ie libertempoj, ni multfoje partoprenis Someran Esperanto-tendaron en Lančov — suda parto de nia lando, kiu estis malmultekosta kaj ni ĝoje travivadis tie ĉiun jaron ĉiam por 14 tagoj, kiel skoltroj sub tendoj kaj vesperoj ĉe bivakfajroj, por kio estas multaj belaj rememoroj. Ĉiam antaŭtagmeze estis kursoj de Esperanto en diversaj grupetoj ankaŭ por infanoj kaj tiel eĉ miaj filinoj ŝatis ĝin lerni.

Multfoje venas tempo dum la vivo de malsukcesoj, familiaj problemoj, malsanoj aŭ mortoj de la plej proksimaj, ĝi ne evitis min. De miaj problemoj ĉiam resanigis min Esperanto, ekzemple dum la legado, korespondado kun multaj esperantistoj el diversaj landoj kaj poste pro diversaj E-aktivadoj. Mi vizitis naŭ UEA-kongresojn kaj en tiu belega atmosfero mi ĉiam forgesis por eta tempo je ordinaraĵoj kaj problemoj.

Multfoje dum mia E-vivo mi klopodis korespondi kun ĉinoj, sed malofte mi sukcesis interŝanĝi pli multajn leterojn kaj ĝis nun mi ne sciis, ĉu tion kulpis politika situacio en Ĉinio aŭ mem la korespondantoj, kiuj en plimulto estis komencantoj.

Antaŭ la 81-a UK, kiu okazis en nia ĉefurbo Prago, venis en mian domon ĉina esperantisto, kiun mi 2 tagojn gastigis kaj poste ni komune kun pluaj esperantistoj veturis en pragan kongresejon. Tiu ĉino fakte estis komencanto; longe daŭris, ol li ion diris sen vortaro kaj mi ne povis kompreni lian kuraĝon partopreni kongreson kun tia malalta scio de Esperanto. La tutan semajnon mi ne vidis lin, nur lastan tagon li invitis min kaj mian filinon en ĉinan restoracion

en Prago por tagmanĝi. Mi estis surprizita, ke li preskaŭ perfekte kun ni parolis Esperanton. Estas videble, ke praktika konversacio kun eksterlandanoj estas super ĉiuj lernolibroj.

Kaj denove en la jaroj alterniĝis sukcesoj kun malsukcesoj. Post perdo de la dua edzo, ankaŭ kiu estas esperantisto, mi estis petita pri organiza helpo ĉe Internacia Kongreso de Esperantistoj-Handikapuloj, ĉar ilia kunorganizantino ĵus mortis. Kompreneble mi klopodis helpi ĉie, kie necesis, kaj tiel malrapide mi ekkonis ne nur membrojn de tiu asocio, sed ankaŭ ilian prezidanton, fondinton de la asocio. Admirinda homo, kiu ĉion sciis, ĉion mem faris, kvankam mem li estis grava handikapito, irinta kun du francaj bastonoj kaj ankoraŭ tute neaŭdanta. Li instruis Esperanton pere de skribaj kursoj, li verkis lernolibron, eldonadis kajerajn bildvortaretojn laŭ temoj por siaj membroj, ĉar por ili estus tro kosta kolora bildvortaro el la Londona Eldonejo, li ĉiun monaton de la fondiĝo de tiu organizaĵo mem eldonadis okpaĝan gazeton por pli ol 250 membroj en Esperanto.

Kiam du homoj kvankam en alta aĝo vidas bezonon de sia helpo por la dua, ne daŭras longe, ke ili amikiĝu, kiam ambaŭ ili restis solaj. Post 4 jaroj de amikeco kaj reciproka helpo mi translokis lin kun la tuta redakcio en mian domon — ja li loĝis 150 kilometrojn de mia hejmo kaj mi tiel povis ĉiutage helpi al li en preparo de gazetoj, skribado de artikoloj ktp. Sed la sorto ne karesis lin spite de ofta kuracado de lia malfermita kruro. Alviciĝis pluaj malsaniĝoj.

Li sentis baldaŭan adiaŭon kaj volis en la lasta momento geedziĝi kun mi. Eĉ ne tutajn tri monatojn mi estis edzino, poste vidvino. Sed kiu anstataŭos lin? La Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kun sia internacia klubo apartenas al la plej viglaj E-organizaĵoj.

Kunvokita komitato ne trovis alian elirsolvon kaj devigis min transpreni la funkcion post mia edzo, ankaŭ pro tio, ke la redakcio estas bone ekipita en mia domo kaj ke mi kutimiĝis plej multe helpi al li.

Transpreni tiun funkcion — ĉu mi kapablas? Mi estas nur ordinara virino, multaj scioj mankas al mi, iam gvidi konferencon aŭ kongreson. Neimageble!

Sed laŭ nia ĉeĥa proverbo — Se vi ne scias naĝi, saltu akvon. Kiam vi devos naĝi, vi naĝos...

Nenio restis al mi ol kreskantan korespondaĵon respondadi, malrapide ekregi la tutan administrativon, lerni kopii sur la kopiomaŝino, kolektadi, traduki, elpensi aŭ aranĝi alvenantajn artikolojn por nia gazeto kaj praktike akcepti proponatan helpon de kelkaj membroj, kiam ili vidis mian malesperan situacion.

Mi devas klopodi, ke Esperanto povu fine enpenetri en tutmondajn organizojn, kie ĝi povu esti sur la sama nivelo kiel la angla lingvo. Bone pri tio skribis nia membro el Usono, kiam li skribis, ke dum 50 jaroj estis multaj kraŝoj pro lingva miskompreno ekzemple ĉe pilotoj. Eĉ ilia usona televida programo agnoskis, ke multaj fremdaj pilotoj kaj surteraj registoj ne sufiĉe bone parolas angle, unu la alian ne komprenas eĉ ĉe la unua helpo ĉe ia akcidento. Kiu lingvo plej fideinde portos informon inter ruso kaj ĉino? Inter bulgaro kaj etiopo? Inter hindo kaj peruano? Sendube Esperanto. Sed, laŭ mia opinio ankoraŭ longe estos okupataj interpretistoj, tradukistoj, ol la mondo pli saĝiĝos. En mia 70-jariĝo mi tiun renverson-turnon ne ĝisatendos.


Per mia lasta frazo mi revenas al la gazeto "El Popola Ĉinio" kaj mi deziras al gvidantoj kaj redaktoroj multe da sukcesoj en plua kvindekdaŭro de eldonado. ■

Elito kaj elituloj

de FRANJO GRUIC (Kroatio)

VIA Ora Jubileo, 1950-2000, estas ankaŭ mia: mi komen- cis la Esperantan vivon en la jaro 1950, trastudinte la lernolibron de Doktoro Ivo Lapenna en la kurso gvidita de sin- jorino Olga Ulrich. “El Popola Ĉinio” estis legata en nia societo en Slavonski Brod (Kroatio) kaj akompanis min kaj nin dum ĉiuj 50 jaroj. La fora Ĉinio fariĝis por ni najbaro, ni vivis ĝian vivon kaj evoluon, ni admiris la landon, his- torion, ni legis la librojn... ni klo- podis lerni kelkajn ĉinajn vort- ojn kaj esprimojn en la kurso pro- ponita de vi (tamen vane!). Viaj 500 numeroj rememorigas min pri miaj 500 Esperanto-lernantoj (aŭ duoble tiom).

Nur unu punkto en la lastaj 50 jaroj ne estas kumuna por ni: mi estas veterano, kaj vi, mira- klo, plijuniĝas de unu monato al alia, de unu jaro al alia. Gratulon pro via 500-a numero! La plej granda parto el la multegaj belaj bildoj montras ridantajn junajn



La aŭtoro

vizaĝojn, mi dirus esperon kaj eliton por morgaŭ, por la nova jarcento, por la estonteco de Esperanto. Jes ja, esperantistoj estas elituloj de la internacia interkonatiĝo kaj interkompreniĝo, precipe la junaj. Tamen vi ne forgesis niajn malpli junajn meritulojn: Bakin, Honfan, Venlo Fon, Zensto, Tikos, B. Vogelmann, M. Boulton, B. Ragnars-

son... Dankon al vi pro la men- cio, dankon al ili pro la meritoj!

Kiel veterano mi modeste konsilus al nia juna elito, ripe- tante la vortojn de Gaston Waringhien (Lingvo kaj Vivo, 1959, p. 362): “Nia devo, al ni, esperantistoj, estas ne luli nin per fan- taziaj esperoj, ni ne varbos en la venonta jaro milionojn da anoj, ni devas penige propagandi, fa- radi kursojn, penetri en la ron- dojn de homoj, kies profesio pos- tulas internaciajn rilatojn aŭ ko- respondadon, por humile propo- ni al ili praktikajn servojn. Kiel ajn blinde rutinemaj estas la ho- moj, ili ne povos finfine ne rimar- ki, ke estas pli oportune kores- pondi kun la tuta mondo per unu lingvo, ol per dekelkaj... Kaj tiel, paŝon post paŝo, ni atingos la faktan pozicion, ke unu belan tagon la mondo povos ĝin nur konstati kaj reguligi per oficial- igo. Tiu aglinio estas la sola ebla, tia estis ankaŭ la konvinko de Zamenhof.”

Al EPĈ pluan progreson kaj sukceson! ■

Ha lo, geamikoj!

de KAREL STROUHA (Ĉeĥio)

KION mi faru? Nenion hel- pas! Ju pli aĝa mi estas, des pli frenezajn kapric- ojn mi ekhavadas.

Post kiam mia maljuna, long- jara korespondamikino eksciigis min, ke pro alta aĝo ŝi ne kap- blas daŭrigi nian korespondadon, mi tuj publike anoncis mian in- tencon eltrovi ie en la mondo

amikon aŭ amikino, kun kiu mi povus, de tempo al tempo, in- terŝanĝi leterojn. Kompreneble sekve mi ricevis kelkajn proponojn. Precipe unu el ili faris al mi sur- prizon kaj grandan ĝojon. Al mi — 65-jara babilema avaĉo, kiu vivis plejparte en la pasinta jarcento — sendis proponon 20-jara studento staranta je sojlo de sia vivo kaj je sojlo de nova jarcento.

Tiu ĉi fenomena ebleco ĉeesti

renkontiĝon de du generacioj, de du jarcentoj estas por mi tre in- teresa kaj agrabla. Dank’ al Es- peranto nobla ideo de internacia kunlaboro kaj amikeco jam feliĉe enpaŝis en novan jarcenton. Es- peranto servas al tutmonda paco kaj EPĈ al Esperanto.

Karaj gesamideanoj, mi ĝojas ke per Esperanto mi povas vivi kun vi sur unu terglobo kiel homo inter homoj. Mi ŝatas vin ĉiujn. ■

Grava anonco

Karaj samideanoj,

Kutime en oktobro, kiam niaj legantoj ricevis "El Popola Ĉinio", ili kune ricevis ankaŭ ĝian abonilon por la sekvanta jaro, sed ĉi-jare la abonilon ni ne sendis. Eble ili miras pri tio. Jes, grava ŝanĝiĝo okazas al nia revuo. Ĉi tie ni informas niajn karajn legantojn, ke ekde la jaro 2001 ni ĉesos presi la revuon, sed daŭrigos la eldonadon rete. Pro tio ni ne plu abonigos la revuon.

"El Popola Ĉinio" kun historio de 50 jaroj havas multajn fidindajn legantojn kaj amikojn. Nun, kiam ni publikigas la informon, ni sentas grandan bedaŭron. Ĉi-momente ni petas komprenon de niaj legantoj, perantoj kaj ĉiuj, kiuj subtenis nin, kaj kore dankas ilin pro ilia amikeco kaj kunlaboro en la pasintaj jaroj.

Ni redonos ĉiujn abonpagojn por la venontaj jaroj. Se iuj deziras aĉeti per tiu monsumo librojn eldonitajn de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, ni plenumos ilian deziron kiel eble plej rapide kaj ĝuigos al ili rabaton. Se niaj legantoj havas aliajn dezirojn aŭ sugestojn ĉi-flanke, ni laŭeble kontentigos ilin. Ni atendas ilian baldaŭan respondon pri tio, kiun manieron pri la redono de abonpago ili preferas.

De longa tempo nia revuo ĝuas grandan ŝaton de niaj legantoj novaj kaj malnovaj.

Pro tio ni sentas ĝojon, ĉar tio kuraĝigas nin por nia laboro. Sed en la lastaj jaroj ni renkontis multajn malfacilojn kaj la ĉefaj estis manko de monrimedoj kaj konstanta malpliigo de la abonantoj. Ni esperas, ke la ĉesigo de preso de "El Popola Ĉinio" ne kaŭzos miskomprenon pri nia sinteno al Esperanto. Kiaj ajn malfaciloj estas kaj estos, ni restos ĉiam fidelaj al ĝia idealo. Ni ŝanĝos nur la eldonan manieron de la revuo, sed la celo uzi kaj disvastigi Esperanton restos sama kiel antaŭe. Kun granda fido ni bone daŭrigos la eldonadon de "El Popola Ĉinio" rete. Ni kredas, ke la homa mondo, kiu eniris en la epokon de reto, donos al nia lingvo kampon disvolviĝi kaj la reta "El Popola Ĉinio" fariĝos nova fenestro enrigardi en Ĉinion. Krome ni havas ankaŭ la ĉinan-Esperantan revuon "La Mondo", eldonatan de la Ĉina Esperanto-Ligo por konigi la ĉinan Esperanto-movadon, studi lingvajn problemojn kaj raportoj pri aktivuloj de la ĉina E-movado. Post rearanĝo ĝi eble fariĝos nova ligilo inter ni kaj alilandaj samideanoj. Unuvorte, ni senŝanĝe uzos nian lingvon por amikeco, homa progreso kaj mondpaĉo.

Ekde nun la nova "El Popola Ĉinio" estas legebla per la reto: www.china.org.cn

La Red.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

★ 40-jara f-ino Hezi dez. kor. tutmonde. Adr.: p/a s-ano Qin Kaiji, Chegongzhuang Xilu 35 Hao, 5-6-641, CN-100044 Beijing, Ĉinio.

★ S-ro Robin Velazqubz V, 19-j., dez. kor. tm., interesiĝas pri kulturo, lingvo kaj sportoj. Adr.: P.O.Box 555, Holguino, CP-80100, Cuba.

★ La infangrupo de la vilaĝo Pedro Betancourt serĉas gekolegojn kiuj povas sendi al ili gantopujojn bestajn aŭ fabelajn. Adreso:

Jose de J. Campos Pacheco, calle 10 % 29 y 31 escl 2908, piso 3 apt F-6, Pedro Betancourt-Matanzas, 42700 Cuba.

★ Ĉiam konstante akceptas korespondo-proponojn kun japanoj. Skribu unuope al Japana Esperanto-Korespondo-Servo; Ĉe KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561-0802 Japanio.

★ En bulgara urbo Gorna Orjahovica aktivas kaj korespondas en Esperanto la Socia Unuiĝo, kiu prizorgas virinojn fariĝintajn viktimojn de perforto. Se e-istoj aŭ E-organizoj deziras interŝanĝi sperton kun ili, bonvolu skribi al la adreso: Tanja Ruseva (por Asocio Marija), strato Rahovec, No 5/II, 5100 Gorna Orjahovica, Bulgario.

Renkontiĝo en Hongkong

de CHEN JI

ORIENTA PERLO

Hongkong estas grava komerca kaj financa centro de Azio kaj ankaŭ kruciĝejo de la kulturoj orienta kaj okcidenta. Nur kiam mi venis en ĝin, mi vidis ĝiajn ĉarmon kaj vivoplenecon. Hongkong, konata kiel Orienta Perlo, altiris al si turistojn tutmondajn. Tie kunfandiĝis la verdaj montoj, lazura maro kaj ĉielskrapaj domoj. Mi kvazaŭ eniris en belan pentraĵon.

La 6-an de aŭgusto la urbo bonvenigis la partoprenantojn de la 56-a IJK. Ĉe la sojlo de la nova jarmilo la kongreson ĉeestis 180 esperantistoj el Japanio, Koreio, Vjetnamio, Francio, Hispanio, Germanio, Italio, Niĝerio, Svedio, Rusio, Pollando, Svisio, Hungario, Meksikio, Kanado, Nepalo, Mongolio, Urugvajo, Norvegio, Nederlando, Ĉinio kaj iuj regionoj.

TRANSIRO AL TUTMONDIĜO

La kongresa temo estas "Tutglobismo en la 21-a jarcento". Pri tio trifoje okazis diskutoj, kaj nemalmultaj pri-traktis tiun temon. Iu diris, ke por individuoj, tutglobismo havas grandan signifon — oni povas libere vojaĝi tra la mondo, pli da interŝanĝoj kaj kontaktoj

proksimigas la popolojn, kaj interreto donas multajn ŝancojn por inerkomuniki kaj amikiĝi. Kaj alia asertis: "Ni esperantistoj apartenas al la homoj, kiuj la unuaj ĝuas la tutglobismon, nia lingvo funkcias kiel pontolingvo inter la popoloj. Kvankam nun la angla lingvo ludas la rolon de mondlingvo, finfine oni uzos veran mondlingvon, kiu probable estos nia Esperanto." La kongresanoj kun malsamaj haŭtkoloroj parolis saman lingvon, kiu ne konas landlimon.

KOLORRIĈA AKTIVADO

Estis 7 kongresaj tagoj rilataj al Temo, Ĉinio, Azio, Ekskurso, Esperanto, Internacia Kulturo kaj Fermo. Dume okazis ankaŭ la 19-a Komuna Seminario (KS) de ĉinaj, japanaj kaj koreaj junaj estoj kaj decidis, ke la venonta KS okazos en Koreio. Krom tradiciaj programeroj, LKK organizis ankaŭ originalajn programerojn en nacia gusto: farado de ĉinaj *ĝjaŭzi*-oj, kiu altiris al si multajn kulinaraĵajn interesiĝantojn, kiuj kaj rigardis kaj demandis kaj imitis. Miksi farĉon, knedi paston... ĉiun precedon ili serioze lernis. Verŝaj-



S-ro Yu Tao, vicprezidanto de LKK

ne, ili volis enkonduki la kuirarton al sia lando. Te-ceremonio el Japanio altiris gastojn per agrablaodoro. Aŭskultante klarigon pri te-farado, ili spektis la prezentadon, gustumis originalan teon kaj spertis la ĉarmon de la te-kulturo. La naturkuracmetodo kuraĝigis kongresanojn por provo, kaj la ĉina *tajĝiĉjŭan* forpelis la dormemon de la ekzercantoj, kiuj akurate kolektiĝis en la ekzercejo je la 7-a ĉiumatene. Kaj *disko*-danco de la Okcidento kaj kaligrafio de la Oriento estis same bonvenaj.

Ĉiutage estis speciala vespera programo: Interkona Vespero, Hongkong-a Vespero, Nacia Vespero, Distra Vespero kaj Adiaŭa Vespero, en kiuj oni interkonatiĝis kaj amikiĝis. Kiam oni devis adiaŭi post la kongreso, en iliaj okuloj legiĝis kaj bedaŭro pri la disiĝo kaj deziro pri la venonta IJK. Ĝis la renkontiĝo en Strasburgo de Francio. ■



Ĝuo de muziko



Laborkunsido

Fragmentoj de IJK

de XIANG HONG

VETERO FAVORIS LA ĈI-JARAN IJK

Antaŭ la kongreso, en Hongkong pluvadis sinsekvajn kvin tagojn, kio ĉagrenis la LKK-anojn, ĉar nemalmultaj aktivadoj devis okazi subĉiele. Por eviti eventualan malfacilaĵon oni decidis okazigi la inaŭguron en la domo. Nigra nubaro daŭre plenigis la ĉielon ĝis la mateno de la 5-a de aŭgusto. Mirinde, suno aperis en la tagmezo, kiam komenciĝis akceptado de kongresanoj. Kaj dum la tuta kongresa semajno estis

belaj tagoj, kun malofta pluveto. Eĉ la vetero en Hongkong favoris nian kongreson.

ESPERANTO PLI MALGRANDIGIS LA MONDON

Maria Martinez el Germanio ŝatas la Orientan kulturon. Ŝi studis la japanan lingvon en Japanio dum unu jaro kaj intencis lerni la ĉinan en Suzhou de Ĉinio por du monatoj post la Hongkong-a IJK. Eble pro tio, dum la kongreso ŝi tuj amikiĝis kun sia samĉambranino Zhang Junqing el la Ĉina Esperanto-Ligo,

malgraŭ ke ĉi tiu multe pli aĝa ol ŝi. La pli surpriza koincido estas, ke filino de s-ino Zhang estas lernanta la germanan lingvon ĝuste en la Universitato de Heidelberg, kie Maria studas. Kaj ili ambaŭ sentis, ke malgranda estas la mondo kaj ĝin pli malgrandigis Esperanto.

KIU ESTAS LA PLEJ "ŜLOSILA"?

Ŝajne dum la kongreso la plej grava estis s-ro Saŭkio, LKK-ano respondeca pri salonoj por prelego, kunsido, diversaj kursoj ktp., inkluzive de la LKK-oficejo. Tial li devis teni multajn ŝlosilojn de



Manĝado de restaĵoj

diversaj ejoj. Krome li instruis ĉiumatene la ĉinan luktarton *tajĝiĉjūan*. Pro tio ĉiutage li frue ellitiĝis kaj malfrue enlitiĝis. Ĉiam, kiam oni renkontis lin tie kaj alie, li estis ŝvitega pro okupiteco. Kaj la demando plej ofte aŭdata de LKK-anoj estas: “Kie estas Saŭkio?” Jen la plej “ŝlosila” persono.

KIUJ ESTAS LA PLEJ LACAJ?

Laŭ aspekto la karavananoj

el Eŭropo estis viglaj kaj energio-plenaj, eble ili estis la plej lacaj kongresanoj ne nur pro tio, ke ili longe vojaĝis per trajno de Eŭropo al Hongkong, kie ili preferis babili trinkante bieron ĝis noktomezo kaj eĉ tra nokto, sed ankaŭ pro tio, ke ili deziris ĝui ĉiujn tipajn aziajn programerojn en tago, kiaj farado de *ĝjaŭzi*-oj, kaligrafado kaj ceremonio de Oomoto. Iuj el ili eĉ mem turismis tutajn du tagnoktojn en la urbocentro, kun helpo de turisma gvidlibro, intencante kiel eble plej

multe sperti la Hongkong-an kulturon dum limigita tempodaŭro. Kredeble ili estis plej multe rikoltintaj, kvankam lacaj.

KIUJ ESTAS LA PLEJ RESPEKTINDAJ?

S-ino Sonoko Kuzume estis konsilanto ĉefe pri azia programo. Krom gvidi Oomoto-ceremonion, ŝi ankaŭ estis

ĉiam helpema pri akceptado de kongresanoj, vojqvido, deĵorado en la LKK-oficejo ktp. Ŝajne ŝi ĉiam ĝustatempe aperis tie, kie oni bezonis helpanton. Ŝi eĉ ne forgesis kolekti florojn por beligi la LKK-oficejon. Jian Weijian bone gvidis la Kanton-dialektan kurson kaj la Hongkong-an Vesperon. Programlistoj, anoncoj k.a. plejparte estis tajpitaj kaj presitaj de li, kiu devis ankaŭ servi vespere al la retpoŝt-uzantoj. Oni karese nomis ilin “bovo”, simbolo de diligenteco. ■

Dankon, IJK!



S-ro Henning Von Rosen (maldekstre)

Henning Von Rosen (Norvegio):

Neforgesebla la lasta semajno restos ĉe mi, ie proksime al mia koro. Mi havas nur unu vorton por la organizantoj kaj partopre-

nantoj: Dankon! Grandan dankon!

Mi dankas al vi, ĉar vi donis al mi ion, kio ne aĉeteblas kontraŭ mono, nek facile troveblas — korvarmon, amikecon kaj iaspecan senton pri la vasteco de nia “hejmo”, nia terĝlobo. Tiu sento al mi bonas. Tre bonas.

Ne forgesu ke mi venas el forlando malvarma, ĉe la pinto de Eŭropo. Mi sentas ke dum tuta jaro mi frostis. En la varmaj Hongkong-aj vesperoj mi ridis, kantadis, interŝanĝis pensojn kun diversaguloj el Vjetnamio, Niĝerio, Japanio, Germanio, Ĉinio, Koreio ktp. Kio alia eblas krom

varmiĝi ĝis kora profundo? Kio povus pli boni ol migreti en la Hongkong-aj montoj kune kun vigla maljuna japanino? Kio povus pli boni ol sperti iom de senmedikamenta kuracmetodo, peceton da prelego, moviĝon malrapidan de *tajĝiĉjūan*, kaj poste iom repleniĝi stomake dank' al la varia ĉina kuirejo? Kio povus... sed jam la tempo venis adiaŭi la novajn geamikojn. Mi esperas nur ke la ĉinaj kantoj restos ĉe mi en la koro dum ankoraŭ iom da tempo, sed tio eble ne tiom gravas. Ĉar nun mi jam scias la lokon, kie ilin trovi; nun mi jam, pli ol antaŭe, sentas ke mi ja loĝas sur planedo abunda je diverseco kultura, abunda je homaj kreaĵoj variaj, abunda je estontaj eblecoj renkonti homojn ĉarmajn kaj interesajn. Dankon, IJK!

Katagawa Ikuko (Japanio):

Mi fakte jam ne apartenas al junularo. Sed mi partoprenis en tiu ĉi IJK, ĉar unue, la loko estas en Azio; kaj due, mi ŝatas la etoson de IJK. Mi kredas, ke IJK estas unu el la plej ĉarmaj aspektoj de Esperantujo.

Vivante kune dum unu semajno, ni renkontiĝis kun diverstontaj homoj. Komence ĉiuj estis iom hontemaj, sed ni tuj amikiĝis parolante nian komunan lingvon en manĝejoj, diskodancejoj, diversaj kursoj amuzaj kaj seriozaj. Ŝajne multaj ŝatis liberan babiladon en ripoztempo. La ordi-



S-ro Elvis Onyeneke (dekstre)

nara nokta pejzaĝo estis, ke junuloj el diversaj landoj en Azio, Eŭropo, Afriko, Ameriko kelkope babilis ĝuante bieron, eĉ ĝismatene. Inter ili troviĝis komencantoj. Sed ne gravas. Tiuj, kiuj tuŝas la ĉarmon de Esperantujo, certe eklernos nian lingvon entuziasme. Ankaŭ mi ja estis tia komencanto.

Ĉi-foje en Hongkong la manĝejo estis ĉin-stila, do ni de kope ĝuis kaj manĝaĵon kaj babiladon ĉirkaŭ ronda tablo. Kaj la kongresejo estis sufiĉe bela, ĉirkaŭita de arbaro, lageto ktp. Noktaj babilejoj ankaŭ estis trovitaj sub arboj aŭ apud la lageto.

Mi kore dankas al ĉiuj LKK-anoj, kiuj ŝvitege laboris por ni.

Elvis Onyeneke (Neĝerio):

Kiam mi survojis al la IJK, kiu ĵus finiĝis, mi neniam atendis renkonti tiom da homoj el diversaj landoj en la mondo. Kiel mia unua Esperanta renkontiĝo, la Hongkong-a IJK estas granda sperto, kiun mi

ne forgesos ĝismorte. Tie mi renkontis bonkorajn homojn, kiuj diversmaniere elmontris la veran celon de Zamenhof, t.e. kuniĝi la tutmondan homaron sub unu ombrelo de paco kaj amikeco.

Kvankam mi malfrue alvenis la kongreson kaj preterlasis la inaŭguron, tamen dum mia unua tago en la kongreso, mi feliĉe ĉeestis la viglan Ĉinan Vesperon. Dum tiu vespero ni ĉiuj ellernis ĉinan amasdancon. Tio ege interesis min, ke mi ne volis ĝin ĉesigi. Fakte la tuta programo de la kongreso estas neforgesinda.

Menciindas ankaŭ la ĉinaj manĝaĵoj, kiujn mi antaŭe neniam gustumis. Mi devas diri, ke mi ŝatas ilin.

Fine mi volas diri, ke dank' al partopreno al IJK mi bone komprenis la laboron de TEJO, kiun ĝia prezidanto klarigis dum la TEJO-forumo.

Se mi finus mian paroladon sen menci la adiaŭan vesperon, tio ne estus bona. Ĉiuj tiuj dancoj, kantoj kaj ŝercoj ĉiam vivos en mia koro.

Pro multaj kialoj mi dankas la organizantojn de tiu ĉi IJK kaj intencas partopreni la venontan.

Ĝis la venonta jaro en Francio!




S-ino Katagawa Ikuko

RAPORTOJ PRI LA 56-A IJK



En la kurso de *Pufonghua* (komuna ĉina parola lingvo)



Lernado de *tajĝiĉjūan*



Junaj e-istoj el diversaj lokoj de la mondo



LKK-anoj kun iuj kongresanoj



La premiito en kaligrafado

第二届绿星国际少儿美术、书法大赛颁奖大会
 PREMIADA CEREMONIO DE LA INTERNACIA KONKURSO "VERO-STELA POKALO" PRI INFANAJ PENTRAĴOJ KAJ KALIGRAFAĴOJ



Premiado

Geedzigo



Gaja amuziĝo
kun la
novgeedzoj

devas viziti la familion de la fianĉino kun donaco kaj doni al ŝi monon dufoje, por ke ŝi aĉetu vestojn kaj aliajn bezonaĵojn. Fine la familio de la fianĉo elektas tagon bonaŭspician, skribas invitilon kaj preparas bonaŭguran donacon por la fianĉina familio, kiu poste faras donacon por la fianĉa familio.

La fianĉina familio preparas doton laŭ sia financa kapablo.

Unu tagon antaŭ la geedziĝa ceremonio, la fianĉa familio donas al la fianĉino



Teksto kaj fotoj de LI NAN

En Yimeng-montaro, Shandong-provinco, ankoraŭ konserviĝas antikva moro de geedziĝo.

Ĝenerale ne povas geedziĝi homoj kun sama familia nomo. Plejparto da homoj devas peti svatadon, kaj poste la du familioj de la gejunuloj vizitas unu la alian por konfirmi, ĉu la vizitata familio taŭgas por la edziĝafero. Kiam la respondo estas jesa, la gejunuloj gefianĉiĝas.

Post la fianĉiĝo la viro



La fratoj
portas la
novedzinon
el la domo.



Orkestro ludanta por bonveni la novedzinon

sur ruĝa tapiŝo aŭ fragmita mato. Kiam ili eniras la pordon, oni krakigas petardojn kaj ludas muzikon. La lokanoj nomas tion “enhejmiĝo”. Enirinte la salonon la novgeedzoj rive-rencas al la ĉielo kaj tero, al la gepatroj kaj unu al la alia. Post tio ili kune eniras la geedziĝan ĉambrom, kie junaj ĉeestantoj gaje ŝercas kun la novgeedzoj. Kaj tiam ili komencas la novan vivon.



La novedzino preta paŝi sur fragmita mato

ruĝajn vatitajn jakon kaj pantalonon, ruĝan vizaĝkovran tukon kaj juvelojn. Kaj la fianĉina familio devas prezenti liston de tabuoj kaj akompanantinoj de la novedzino por la geedziĝa ceremonio.

En la geedziĝa ceremonio, la novedzino portas ruĝajn vatitajn jakon kaj pantalonon, kaj verdajn vatitajn ŝuojn, kun ruĝa vizaĝkovra tuko kaj nova mantuko. En la bonaŭspicia horo ŝiaj fratoj portas ŝin el la ĉambro kaj helpas ŝin eniri en la palankenon. Post tio la muzikistoj antaŭiras la palankenon survoje al la novedza domo.



La novedzo devas bonveni la palankenon ĉe sia pordo. La novgeedzoj paŝas



La novedzino antaŭ enpalankeniĝo



La fragmita mato, sur kiu paŝis la novgeedzoj, devas esti levita kaj pasigita super ilia kapo, kio aludas, ke ili kune antaŭeniros ĝis maljuneco.



La novgeedzoj flustrantaj post la ceremonio



Por volvi la kapharojn de la novedzino per ruĝaj fadenoj

ĈINIO

● Ekde aŭgusto 2000 en la



Esperantista renkontiĝo en Zhongshan-parko

dua sabato de ĉiu monato Shenyang-aj e-istoj en Liaoning-provinco okazigas en la parko Zhongshan E-aktivadon. Tie ili faras konversacion, informo-interŝanĝon, intelektan konsultiĝon k.a. Usona e-istino Robin, kiu laboras en la urbo Shenyang, ĉiufoje partoprenis la aktivadon. Tutmondaj e-istoj, kiuj vojaĝas al Shenyang, estas bonvenaj al la aktivado. Tel.: 024-88312941 aŭ 13019373640 (Li Liang)

EGIPTIO

● En la haveno de Sharm el Sheikh estis nova ŝipo, kies nomo estas "Esperanto". Kiam oni de-



La ŝipo "Esperanto"

mandas al la teamo pri ĝia signifo, oni ricevas klarigojn kaj plurlingvan flugfolion, ankaŭ esperantlingvan: "Kial Esperanto?" — Por elvoki lingvon de ĉiuj facile lerneblan, kreitan en 1887, por ke la homoj de ĉiuj etnoj povu interŝanĝi siajn ideojn, sentojn, spertojn en amikeca etoso kaj laŭ nivelo

de kompleta egaleco. (Raymond Lecat)

FRANCIO

● Ĉu planto el ekvatora Afriko estas mirakla kuracilo kontraŭ la toksomanioj? Legu en Esperanto la sciencajn informojn ĉe: <http://perso.wanadoo.fr/eric.coffinet/Iboga/meyaya-esp.htm>

Bonvolu ankaŭ viziti dulingvajn hejmpaĝojn (en Esperanto kaj en la franca lingvo) pri medicino, turismo kaj Bahaismo ĉe: <http://perso.wanadoo.fr/eric.coffinet/Accueil.htm> Komentoj, konsiloj kaj korektoj estos bonvenaj. Adreso: Doktoro Eric Bernard Coffinet, 307 Promenade des Anglais, 06200

Nice, Francio. Fakso: (33) 493 716 972 Ret-poŝto:

Eric.Coffinet@wanadoo.fr

(Eric Coffinet)

JAPANIO

● La 49-a Esperanto-Kongreso en la regiono Kanto okazis en la Universitato Meiji de Tokio inter la 24-a kaj 25-a de junio 2000. Ĉeestis ĝin pli ol 130 e-istoj. S-ro Ulrich Lins el Germanio kaj s-ro Narendra Bhattarai el Nepalo faris prelegojn. La partoprenantoj promenadis en historiaj lokoj ĉirkaŭ Otyanomizu.

(Jingjing)



S-ro Ulrich Lins kaj Jingjing

VJETNAMIO

● Memore al 110-jariĝo de la iama vjetnama prezidanto Ho Chi Minh okazis E-Ekspozicio pri Ho Chi Minh, konsistante el 110 paĝoj eltiritaj el diversaj E-revuoj, kiaj Paco, Vjetnamio Antaŭenmarŝas, Nuntempa Bulgario, El Popola Ĉinio, Hungara Vivo, Starto, Verda Kolombo, Internaciistoj, Orienta Revuo, Esperanto ktp. Ĉiuj paĝoj estas rilatantaj al la personeco, verkoj kaj revoluciaj agadoj de la respektata s-ro Ho. Ĉiu paĝo estas kadrita de bela pentraĵo. La ekspozicio allogis pli ol 30 invitatajn gastojn.

(Dang Dinh Dam)

Neĝmonto Yulong



Primitiva arbaro 3 000 m super la marnivelo

Teksto de ZHAO XI
Fotoj de LIU SIGONG

La neĝmonto Yulong, konata kiel plej malaltlatituda glacirivero de Ĉinio, imponas sur altebenaĵo. Ĝia ĉefa pinto altas 5 596 m. kaj ĝia parto je 4 500 m. super la marnivelo estas ĉiam neĝkovrita. Inluata de musono, ĝi apartenas al la maraj varmetaj glaciriveroj.

Pro la influo de geomorfologio la orienta kaj okcidenta deklikvoj de la neĝmonto evidente diferencas inter si per naturaj pejzaĝoj. La vegetaĵoj malsamas laŭ topografio, klimato, grunda konsisto k.a. Sur la monto

belas pejzaĝoj de sep naturaj zonoj, de flaŭro de savano ĝis glacirivero en la supro de la monto, kie kreskas nenio.



La neĝmonto Yulong allogas homojn per siaj ekologia medio nepoluita, imponaj glacirivero kaj neĝmaro, belaj kaskadoj, primitiva arbaro kaj kvieta stepo...




En primitiva arbaro



Telfero en profunda montaro







- 1 Glaci-rivero en montvalo
- 2 La neĝmonto Yulong
- 3 Glaci-rivero sur montpinto
- 4 Antaŭ grimrado

● KURANTAJ AFEROJ

● La altpova komputilo Shenwei n-ro 1 estis farita en Ĉinio. Ĝi estas 1.9 m alta kun kalkula rapideco de 384 miliardoj da fojoj ĉiusekunde. Dank' al ĝia kreigo Ĉinio fariĝis unu el la malmultaj landoj, kiuj kapablas fari altpovan komputilon. La nomita komputilo povas ne nur levi la rapidecon de kalkulado, sed pli grave, pere de la supera kalkulado, atingi la rezulton, kiun ordinaraj komputiloj ne povas, kio estas tre utila al scienc-teknika disvolvo kaj esplorado en la kampoj de aeronautiko, kosmonautiko, veterprognozo, oleprospektado kaj vivologio kaj utila al disvolvo de la nacia ekonomio.

● En Ŝanhajo prepariĝis la kerna peco de la reaktoro de nuklea elektrejo de miliono da kW. La reaktoro estas 127 tunojn peza kaj ĝiaj ĉefaj pecoj estas precizaj maksimume je 0.1 mm. La reaktoro estas farita por la Nuklea Elektrejo Ling'ao, la dua granda nuklea elektrejo post Dayawan en Guangdong-provinco.

● Ĉinaj sciencistoj atingis rimarkindajn sukcesojn en esplorado de leŭkemio. Ili ne nur sukcese disigis kaj klonis genojn de kelke da novaj virusoj, sed ankaŭ konstatis, ke tiuj genoj sin montras aparte en la ĉeloj de akuta leŭkemio.

La esplorado montras, ke oni povas ne nur preventi leŭkemion per kontraŭvirusaj vakcinoj, sed ankaŭ kuraci ĝin per antivirusoj, nun ĝenerale per kemiterapio.

● La 16-an de junio ĉi-jare, naskiĝis en la Nordokcidenta Ter- kaj Forstokultura Universitato, Ĉinio, kaprido Yuanyuan, klonita je korpa ĉelo de plenkreska kapro. Ĝi tamen vivis nur



Klonita kapro

36 horojn pro malbona funkcio de pulmoj. Post 6 tagoj naskiĝis alia klonita kaprido Yangyang, kiu kreskis sane. Fakuloj diris post ekzameno, ke Yuanyuan kaj Yangyang ambaŭ estis klonitaj je korpa ĉelo de kapro de Qingshan.

● Aŭguste de 2000 s-ro Zhang Jian, instruisto de la Pekina Sporta Universitato, sukcese transnaĝis la 123.58-kilometran Bohaimarkolon en 50 horoj kaj 22 minutoj. Per tio li kreis novan rekordon de vira transnaĝo de markolo. Albordiĝinte, li akceptis fizikan ekzamenon en hospitalo.

kiu konkludis, ke lia sanstato estas bona.

● Inaŭguriĝis la Muzeo de la Tombo de Duko Jing n-ro 1. Tio estas unu el la plej grandaj antikvaj tomboj ĝis nun prifositaj en Ĉinio.

La tombo situas en la gubernio Fengxiang, Shaanxi-provinco. La tombo mastro estas Duko Jing (577-537 a.K. en potenco) de Qin-

regno, kiu havis grandan influon siatempe. La katakombo longas 59.4 metrojn de oriente okcidenten kaj larĝas 38.8 metrojn de sude norden. La katakombo kaj la tombaj vojoj havas formon de kun totala longeco de 300 metroj kaj areo de 5 334 kvadrataj metroj.

En la muzeo oni povas vidi la grandiozan katakombon, la arkitekturan aranĝon de la subtera dukejo, kunentombigitajn valorajn objektojn kaj ĝis nun prifositan plej grandan tombon en Ĉinio en formo de renversita piramido.



Zhang Jian post transnaĝo de Bohai-mar

Vestoj de ĝingpo-oj



Fotoj de LI CHUNSHENG

La ĝingpo-oj plejparte vivas en la Dehong-a Taj- kaj Ĝingpo-nacia Aŭtonoma Subprovinco en Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio kaj malgrandparte en aliaj lokoj. Ili loĝas en montaro 1 500 metrojn super la mar-nivelo. La ĝingpo-oj estas lertaj en kantado kaj danco, precipe en grupa danco. En la ĝingpo-a festivalo kun longa historio ili prezentas belajn kantojn kaj dancojn.

La virinoj portas nigran



En gaja festo

veston kaj belkoloran jupon, kun arĝenta ornamajo. La viroj ofte portas nigran veston kaj pantalonon kun mallongaj kaj lozaj krurumoj. La maljunuloj volvas sian

harplektaĵon, kovritan per nigra tuko. La junuloj, kiuj ŝatas volvi blankan tukon sur la kapo, portas longan glavon kaj teksitan sakon kun belaj desegnoj. Per firmaj paŝoj ili montras sian kuraĝon kaj malcedemon.



Ĝingpo-aj viroj en naciaj vestoj



Ĝingpo-aj virinoj en antikvaj naciaj vestoj





Ĝingpo-aj viroj en antikvaj naciaj vestoj



Kapornamo de ĝingpo-a viro



Bele vestitaj ĝingpo-aj virinoj

Foto de LIU SIGONG

Raportoj pri la okcidenta Hubei-provinco (II)

Post tio estas pli interesa okupado de lito: post kiam la novgeedzoj finas la riverencadon, ili devas konkure kuri en sian ĉambron por okupi la liton la unua. Kiu la unua sidiĝas sur la liton, tiu povas mastri la familion.

Teksto de WANG HANPING
Fotoj de PENG YIXIN

LICHUAN, FONTO DE QINGJIANG-RIVERO

Qingjiang-rivero, 400-kilometra branĉo de Yangzi-rivero, trairas Enshi. Kiam ni venis al Lichuan, kie fontas Qingjiang-rivero, ni vidis kontinuon da montoj. Kontaktiĝante kun Tuĝjaciĉoj, kiuj ŝatas kanti kaj danci, ni tuj perceptis la senliman favoron de la naturo al la nacio. Ni ebriiĝis de la moroj de la nacio.

En Lichuan oni diris al ni, ke tie estas multaj vidindaj lokoj, kie oni povas vidi originalajn turismajn spektaklojn, ekzemple kaverno, kantokonkurso, arboreĝo, antikva puto kaj naciminoritata vilaĝo. Ni rigardis tri el la kvin.

La kaverno Tenglong ĉe Qingjiang-rivero estas unu el la plej grandaj turismaj kavernoj de Ĉinio. Ĝi konsistas el senakva kaverno, akva kaverno kaj eksterkaverna vidindaĵo. La senakva kaverno estas la sekiĝinta riverlito de la kaŝita fluo de Qingjiang, kie la grundo estas tre ebena. Ĝi, alta 72 metrojn kaj larĝa 64 metrojn, areo 150 milojn da kvadrataj metroj. En la kaverno ni dancis la mano-svingan dancon kune kun junulinoj de la nacio, kaj la gaja kanto resonadis en la profunda kaverno. La ĉefa ko-

ridoro en la kaverno longas 52 kilometrojn, kun pli ol 300 branĉoj. Ĉe la aperturo de la akva kaverno la kaŝita fluo elfluas kaj formas grandiozan falakvon falantan en fendon pli ol 90 metrojn profundan. Akva nebulo kaj surdiga bruoj estigitaj de la falakvo formis miraklan vidaĵon.

Popolkantoj de la loko estas saturitaj de lokaj gustoj. En sezono plena de kamplaboro, tie kaj tie ambaŭflanke de Qingjiang-rivero leviĝas gajaj kaj laŭtaj kantoj, ŝajne responde al la "ruk ho ruk" de la bravaj ŝipistoj batalantaj kontraŭ la furioza torento de Qingjiang-rivero. En postse-

zono la kantoj temas pri arda strebado al amo kaj feliĉa geedziĝo. "Hodiaŭ liberan tempon mi ne havas, morgaŭ branĉohakadon mi faros, do post morgaŭ mi ĝoje vin akceptos...", la kanton instruis al ni fraŭlino Li, nia tuĝja-vojevguidanto. Tie la plej multe kantata kanto estas "Kanto de Draka Boato", kiun oni kantas dum konkurso de drakaj boatoj. Antaŭ pli ol 40 jaroj tiu popolkanto jam estis vaste konata en Ĉinio kiel unu el la plej ŝatataj amantoj. Antaŭ dekelke da jaroj la kanto estis enlistigita kiel unu el la 25 plej bonaj popolkantoj de la mondo. Aŭskultante la kantadon

de fraŭlino Li, ni kvazaŭ renkontis ĉarman tuĝjan knabinon, kiu kantas ĉe la rivero: "Kiu volontus helpi min, knabinon, kiu volas transiri la riveron?"

En Lichuan estas urbo Moudao, kie kreskas metasekvojo. La arbo altas 35 metrojn, kun brusta diametro de 2.4 metroj. Ĝi havas jam pli ol 600 jarojn kaj estas nomata "Reĝo de Metasekvojoj". Fosilia metasekvojo estis trovita unue en la kretacea-terciara stratumo en Groenlando. Glaciriveroj kovras la Nordan Amerikon kaj tie jam ne troviĝas metasekvojo. La trovo de la metasekvojo en 1941 altiris grandan atenton de la mondo kaj ĝiaj semoj estis donacitaj al multaj landoj. Tial ĝi estis honorita kiel "la unua metasekvojo en la



Metasekvojo

mondo". Ĝi estas viva fosilio por paleontologia kaj paleogeologia studo kaj ludas la rolon de akcelilo de amikeco kaj akademia interŝanĝo de Ĉinio kun aliaj landoj. En la pasintaj pli ol 50 jaroj ĉ. 100 ĉinaj kaj alilandaj fakuloj venis esplori la arbon kaj publikigis pli ol 1 000 disertaciojn, kaj 70 el ili doktoriĝis pro sia distingiga faka studo.

NUPTO DE TUĜJA-OJ

Tuĝja-oj vivas en montaro en la baseno de Qingjiang-rivero, kaj vilaĝo kutime konsistas el deko aŭ dekoj da familioj portantaj saman familian nomon. Kune kun alinacianoj, tuĝja-oj kreis originalan arkitekturon de palafita domo, kiu staras sur deklivo, kun posta parto rekte sur la tero kaj la fronta parto subtenata de fostoj. Homoj loĝas en la supra etaĝo kaj brutoj estas bredataj sube. Tia domo taŭgas por la medio tre malseka kaj abunda je venenaj serpentoj.

La nupto de tuĝja-oj estas tre interesa, kaj ni estis feliĉaj, ke ni vidis la ceremonion.

La tuta procezo de nupto konsistas el plorado, barado ĉe la pordo, eliro de la pordo, baro al palankeno, konkura okupado de lito kaj vizito al la novedzinaj

gepatroj. Geedziĝo estas feliĉa afero, sed tuĝja-oj komencas nupton per plorado. Novedzino ploras plurajn tagojn ĝis la fino de la nupto. Ŝi ploras sola aŭ la patrino kaj fratinoj ploras kune. Ili kantante ploras pri la disiĝo. Antaŭvespere de la nupto la familio de la novedzino invitas 9 fraŭlinojn por kanti la "Kanton de 10 Fratinoj" kune kun la novedzino. En la sekvanta tago, kiam la bonveniga grupo de la novedzo venas al la hejmo de la novedzino, ŝiaj familianoj metas antaŭ la pordon tablon, tio estas "barado ĉe la pordo". Ambaŭ flankoj invitas po unu kantanton, kiu devas konkursi pri kantado. Se la kantanto de la novedza flanko gajnas la konkurson, la novedzina flanko formovas la tablon. Se alie, la kantanto devas trarampi sub la tablo. Kiam la novedzino estas forironta de la gepatra hejmo, ŝia frato aŭ bofratino devas surdorse elporti ŝin el ŝia ĉambro kaj surmeti sur ŝin novan paron da broditaj ŝuoj pretigitaj de ŝia bopatrino, kaj nur tiam ŝiaj piedoj povas tuŝi la teron. Kiam la novedzino estas ekironta, oni devas etendi super ŝi paperan ombrelon ĉu en serena ĉu en pluva tago kaj ludi fluton kaj *surnon* (blov-instrumento). Kiam la palankeno venas al la pordo,

ŝamano metas longan benkon inter la pordo kaj palankeno. Sur la benko brulas kandeloj kaj incenso, kaj la ŝamano ekzorce murmuradas sorĉajn vortojn tenante kokon en la mano. Post tio estas pli interesa okupado de lito: post kiam la novgeedzoj finas la rivercadon, ili devas konkure kuri en sian ĉambron por okupi la liton la unua. Kiu la unua sidiĝas sur la liton, tiu povas mastri la familion. En la sekvanta tago la novedzo eskortas la novedzinon al ŝia hejmo kaj dungas portiston por porti al la hejmo de la novedzino pladojn de bankedo, per kiu li regalas la parencojn de la novedzina familio. Ili devas reveni en la sama tago, sen tranokti ĉe la gepatroj de la novedzino.

Nun la nupto de tuĝja-oj estas multe simpligita. Fakte la gejunuloj de Tuĝja-nacio delonge estas liberaj en am-afero. Tie estas la kutimo okazigi renkontiĝon de gejunuloj de Tuĝja- kaj Mjau-nacioj.

En la 12-a tago de la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro, gejunuloj portas sur si festan kostumon. La fraŭlinoj portas sur si la plej belajn vestojn, longajn interne kaj mallongajn ekstere. Ili tenas sin grave ŝajnigante ion vendantaj. Ili sidas sur renversita bambua korbo por atendi "klienton". Dum la junuloj portas malplenan korbon oblikve ĉe la ŝultro kaj tenas sin liberanime. Se iu junulo trovas deziratan fraŭlinon, li iras ĉe ŝi ŝajnigante sin aĉetanta ion ĉe ŝi. Dum marĉando la fraŭlino intence postulas altan pagon por provi lian intelekton. Se la fraŭlino postulas pli kaj pli altan pagon, tio sugestas, ke la junulo ne plaĉas al ŝi. Se la fraŭlino postulas moderan pagon, tio aludas, ke ŝi estas kontenta pri li. Kaj tiam la feliĉa junulo sekvas la fieran fraŭlinon en arbaron aŭ alian ombrejon por verŝi la koron per kantado. Kiam la paro venas al la interkonsento, la junulo povas iri al ŝiaj gepatroj por esprimi sian deziron. ■




Geedziĝa ceremonio de tuĝja-oj

Foto de WANG HANPING



Tuglo a familio

Foto de WANG HANPING



Bonvenigantoj de
la novedzino
Foto de
WANG HANPING



Plorado en nupto



Antikva kastelo de tuĝja-oj

Paŝtiĝo

Sur Qingjiang-rivero



Sindediĉo al aferoj por maljunuloj

Kiam la entrepreno devis redukti la nombron de siaj membroj, iu el ĝiaj mezgradaj funkciuloj memvole forlasis la okupon; sukcesinte en alia kampo dank' al sia penado, ŝi starigis per sia propra mono maljunulejon, klubon kaj universitaton por maljunuloj...

de DONG PING

ŜI nomiĝas Han Pinmei. En majo 1994 la Labor-serva Kompanio de la Nankina Brakhorloĝa Fabriko devis redukti la nombron de siaj membroj pro financa krizo. Tiutempe en Ĉinio malofte okazis, ke laboristoj subite perdis sian laboron, kaj senlaboreco estis rigardata kiel katastrofo. Han, kiu laboris kiel sekciestrino kaj prezidantino de la laborista sindikato de la kompanio, pensis en si: Se la nombro de laborantoj ne reduktiĝos, la entrepreno certe bankrotos kaj pli da homoj perdos la laboron. Do, ŝi memvole petis, ke la kompanio senlaborigu ŝin.

Post kiam ŝi forlasis la kompanion kaj kolegojn, ŝin tuj invadis la konfuziĝo. Sed ŝi ja ne povis retiriĝi. Bone konante la merkaton de vestoj, ŝi luis budon en bazaro kaj sin ekokupis pri komercado de vestoj. Ĉiutage, antaŭ tagiĝo ŝi biciklis al la bazaro kun sakoj grandaj kaj malgrandaj. Ŝi suferis kaj venkis multajn malfacilojn. Du jarojn poste, ekfunkciis la bazaro Yinqiao en Nankino kaj ŝi luis tie ses budojn, kaj pro tio ŝi famiĝis en la bazaro.

La komerco de Han pri vestoj prosperiĝis. Iuj mezaĝaj virinoj petis ŝin: "Ni havas malfacilon trovi okupon pro maloportuna aĝo kaj fari komercon pro manko de mono. Kion fari?" Han bone

komprenis ilin. Ŝi pensis, ke ŝi ne povas bone flegi la malsanan patrinon pro okupiteco kaj tio fakte estas socia problemo. Jam antaŭlonge ŝi volis starigi maljunulejon, sed estis embarasita pro manko de mono. Nun ŝi fariĝis tiel forta en ekonomio, ke ŝi povas realigi sian deziron kaj samtempe doni laboron al tiuj mezaĝaj virinoj.

Ŝiaj familianoj ne komprenis, kial ŝi riskas entrepreni neprofitodonan maljunulejon, kiam viglas la komerco pri vestoj. Sed Han opiniis, ke en la nuna socio pli kaj pli multiĝas maljunuloj, do la servo por ili estos ne nur perspektiva, sed ankaŭ filantropia.

En 1998 Han luis duetaĝan domon kun areo de pli ol 600

kvadrataj metroj kaj ekfunkciigis la maljunulejon Tongyuan en Nankino. Ekde la komenco ŝi klopodis doni plej bonan servon al maljunuloj. Singardemaj, la maljunuloj ĵus venintaj en Tongyuan ne povis vivi en harmonio. Pro tio ŝi faris regulon, ke la flegistinoj familiariĝu al ili kaj bone servu al ili, ekz., bani ilin kaj tondi al ili la harojn kaj ungojn. Ankaŭ ŝi tiel faris en la maljunulejo. Kiam ŝi prenis la piedon de maljunulo en sian sinon, li ne plu estis tro singardema kaj liaj gefiloj trankviliĝis.

Por krei familian etoson, Han donis grandan atenton al manĝo, medio kaj amuzado de maljunuloj. Ĉiutage la maljunulejo 4-foje liveras manĝaĵojn de diversaj



Han Pinmei (staranta) kaj maljunulinoj



Han Pinmei babilas kun maljunulino.

gustoj. En la maljunulejo estas amuza ĉambro kaj legoĉambro kun pli ol 10 ĵurnaloj kaj gazetoj. Oni organizis la maljunulojn diveni enigmojn, fari ludojn, kanti kaj ekskursi. Multaj el la maljunuloj ne volis hejmen reveni, eĉ en la festaj tagoj.

En la maljunulejo vivas 13 senilaj demenculoj, inter kiuj estas profesoro kun tre malbona memoro. Kiam lia edzino kondukis lin al la maljunulejo, li protestis dirante, ke li preferas resti hejme. La edzino larme diris, ke li ne volas iri al nekonata loko, sed ilia hejmo troviĝas en la 24-a etaĝo kaj li plurfoje intencis salti malsupren, kio ege maltrankviligis la familianojn. Aŭskultinte, Han iris

al li, varme brakumis lin kaj vokis lin "instruisto". Ŝi pretendis, ke ŝi estas lia plej bona lernanto. Ŝin rigardante, li diris kun suspekto, ke ŝi estas iom konata, sed li ne povas rememori ŝin. Ŝi admonis, ke li loĝu tie kelkajn monatojn, ĉar tie estas lia hejmo. Li dubis. Ankaŭ la flegistinoj diris: "Jes, tie estas via hejmo." Do, li duonkredante restis en la maljunulejo. Poste, li ne volis forlasi tiun "familion" pro la bona servo. Senilaj demenculoj ne nur havas malbonan memoron, sed ankaŭ estas obstinaj, malpaciencaj kaj indiferentaj por sato kaj malsato. Post longtempa praktikado kaj esplorado Han trovis jenajn flegmanierojn: obei ilin, deturni ilian atenton, gvidi ilian penson kaj laŭdi ilian agon. Tio bone efikis kaj vekis la atenton de fakuloj pri la problemoj de maljunuloj. La sociologia fakultato de la Nankina Normala Universitato prenis la maljunulejon kiel sian praktikejon.

La maljunulejo renomas pro siaj bonaj servo kaj medio. Nun en la maljunulejo vivas 33

maljunuloj. Dank' al la eminenta laboro de Han, la maljunulejo iom profitas.

Han opiniis, ke vivteni la maljunulojn estas nur parto de la aferoj por ili. Sekve de multiĝo de maljunuloj, la servado al ili devas esti pli multflanka, por ke ili estu ĝojaj, povu lerni kaj kontribui en sia maljuneco.

Pasintjare Han ekfunkciigis klubon por maljunuloj en trafikfacila loko en Nankino. En ĝi maljunuloj povas manĝi kaj trinki, kanti kaj danci, ludi ŝakon kaj kartojn. Ĝi allogis multajn maljunulojn. Ĉi-jare ŝi starigis kursojn por maljunuloj, en kiuj ili povas lerni gimnastikon, meztarton kaj manlaboron. Pli ol 30 maljunuloj sin anoncis por lerni en la kursoj. Ŝi intencis starigi pensionon en pitoreskejo kun oportuna viv-kondiĉoj en antaŭurbo de Nankino, kie oni povos kaj lerni kaj amuziĝi.

Han celas fondi en la estonteco servo-centron por maljunuloj rilate iliajn loĝadon, lernadon, amuzadon, sanprotektadon, kuracadon k.a. ■



Ekskurso



Agronomia urbo en okcidenta Ĉinio

Oni diras, ke en la 20-a jc. a.K. Houji, prapatro de la ĉina agrikulturo, instruis al la loĝantoj terkulturon. En la 30-aj jaroj de la 20-a jc. tie fondiĝis agronomia kaj forstokultura kolegio, la unua lernejo tiukampa en nordokcidenta Ĉinio, kiu poste disvolviĝis en la Nordokcidentan Agronomian Instituton.



Loĝkvartalo en konstruado

Teksto kaj fotoj de
LU ZHONGMIN

CELE solvi la problemon pri nutraĵoj de la granda ĉina loĝantaro en la 21-a jc., la ĉina registaro decidis fondi la Modelan Agronomian Regionon Yangling en 1997. Kaj ĝiaj fondintoj decidis fari ĝin la unua agronomia "silicia valo" en Ĉinio.

Yangling situas en la meza parto de Shaanxi-provinco, Ĉinio. Norde de ĝi estas la Leŭsa Altebenaĵo. Weihe, la plej granda branĉo de la Flava Rivero, trafluas ĝin. Dum longe ĝi havas striktan rilaton kun la ĉina agrikulturo. Ĝi estis lulilo de la antikva ĉina agrikulturo. Oni diras, ke en la 20-a jc. a.K. Houji, prapatro

de la ĉina agrikulturo, instruis al la loĝantoj terkulturon. Jen komenciĝis agrikulturo en Ĉinio. En la 30-aj jaroj de la 20-a jc. tie fondiĝis agronomia kaj forstokultura kolegio, la unua lernejo tiukampa en nordokcidenta Ĉinio, kiu poste disvolviĝis en la Nordokcidentan Agronomian Instituton.

La modela regiono kovras 22.12 kvadratajn kilometrojn. Ĝi konsistas el la kvartalo de Agronomia Akademio, sinteza ĝardeno de agrikulturo, kvartalo por servo al la loĝantoj, turisma loko kaj ripozejo. La Internacia Konferenca Centro nun estas en streĉa konstruado. Novembre ĉi-jare centmiloj da ĉinaj kaj alilandaj komercistoj vizitos la 7-an Foi-

ron de Altteknologiaj Agrikulturaj Fruktoj en Yangling. Oni koniĝis al mi, ke nur kelkajn jarojn post la fondiĝo de la modela regiono jam formiĝis industria strukturo kun moderna agrikulturo, biologia inĝenierio, produktado de akvoŝparaj irigaciaj instalaĵoj, agrikultura kemiindustrio, farmacio kaj prilaboro de agrikulturaj produktaĵoj kiel la ĉefaj. Aro da entreprenoj, kiuj posedas intelektan proprieton de novaj altteknologioj, fondiĝis unu post alia en Yangling.

Ĉinio estas lando, kie serioze mankas akvo. En nordokcidenta Ĉinio, kiu konstante suferas de trosekeco, 80% de la akvo estas utiligataj por irigacio, tial plen-

energia popularigo de akvoŝparaj instalaĵoj estas tre utila kaj al medioprotektado kaj al ekonomia konstruado. En 1990 Ĉinio komencis enkonduki akvoŝparajn instalaĵojn el Israelo, sed elspezi grandan monsumon por la instalaĵoj estas ekster la pagipovo de la kompare malriĉaj kamparanoj de nordokcidenta Ĉinio. En tiu situacio juna sinjoro Long Xingyuan, kiu revenis la hejmlandon de Usono, gvidis aron da sciencistoj kaj teknikistoj en fondo de Qinchuan-kompanio de Akvoŝparaj Irigaciaj Instalaĵoj. La kompanio ellaboris 7 seriojn da akvoŝparaj irigaciaj instalaĵoj, malkaraj kaj konvenaj al la lokaj kondiĉoj, kaj dank' al ili oni povas utili-



g i la akvon je 90% (sed antaŭe nur 17%) kaj mallevi la elspezon por irigaciado je triono, tial la instalaĵoj estas tre bonvenaj al la tieaj kampar-

anoj.

Yangling estas riĉa je sciencistoj kaj teknikistoj. Sole en la Nordokcidenta Agronomia-forstuma Universitato estas 270 laboratorioj, 4 000 esploristoj kaj instruistoj de 70 fakoj, kiuj prezentis 5 000 scienc-esplorajn fruktojn, el kiuj multaj estas avangardaj enlande kaj iuj eĉ internacie, kiaj senakva terkulturo, produkto de bonrasaj plantoj, inĝenierio pri sekrecio de dombesta produktiĝo kaj embrioj, sinteza reordigo de grunda eroziigo sur la Leŭsa Altebenaĵo, protekto kaj utiligo de la vegetaloj.

Dum jarmiloj la malkompakta Leŭsa Altebenaĵo serioze ero-


ziigis pro lavado far la Flava Rivero. Oni taksis, ke ĉiujare la baseno de la Flava Rivero perdas 1.8 miliardojn da tunoj da leŭso, el kiuj 800 milionoj da tunoj estas el Shaanxi-provinco. Prof. Lu Zongfan, 61-jara, estas fakulo pri reordigo de la Flava Rivero. Dum longa tempo li sin okupis je esploro pri ekologia agrikulturo kaj penadis sur la Leŭsa Altebenaĵo jam 40 jarojn. Nun la naskiĝo de la modela regiono donis al li ŝancon por popularigi liajn scienc-esplorajn fruktojn. Li fondis sian eksperimentan bazon en Ansai-gubernio, kie plej serioze eroziigas grundo kaj malriĉe vivas la kamparanoj. Sub lia gvido la kamparanoj faris interplantadon de greno kaj herboj sur montodeklivoj 25-30-gradaj, t.e. ili kulturis parcelon da greno sur montodeklivo kaj post tio parcelon da herboj, ĉiu kun larĝeco de pli ol 8 metroj, kaj sur ĉiu montodeklivo estas pli ol 5 tiaj rubandaj parceloj. Sur la montoj vidiĝas spirale leviĝantaj grenplantoj kaj herboj, kiuj evitis grundan erozion kaj donis bonan ekzemplon de ekologia terkulturo.

Prof. Li Zhenqi estas ĉefiniciatinto de instruado de botanika imunologio kaj studo de tritika rusto. En granda valo ĉe Maijimonto, Gansu-provinco, facile rustiĝas tritiko. Tie li faris esploron 20 jarojn kaj antaŭ nelonge establis laboratorion en Yangling. Ĉiutage tiu 78-jara profesoro kune

kun siaj esplor-studentoj iris kaj reiris inter la laboratorio kaj la kampo, senlace farante studon pri prevento kaj kuraco de tritikaj malsanoj kaj kulturado de bonrasaj semoj. Li diris: "Mi bone memoras la lastajn vortojn de mia patrino: vi estas filo de kamparanoj kaj devas liberigi ilin el mizero."

Brutobredado estas tre grava por nordokcidenta Ĉinio. En la eksperimenta brutobredejo de Yangling estas 5-generacia grupo el 45 kaproj klonitaj je embrio. Tie estas ankaŭ la unua klonita kapro en la mondo, kreskinta en nutrolikvaĵo, generita eksterkorpe, kaj kapro klonita je korpa ĉelo. Ili estas fruktoj de prof. Zhang Yong post plujara scienc-esplorado. Kvankam li estas nur pli ol 40-jara, tamen akiris rimarkindajn sukcesojn en la altscienca kampo de klonado de kapro. Li posedas kompletan teorion kaj teknikon pri klonado de dombesta embrio. Li diris: "La tradiciaj kaproj en nordokcidenta Ĉinio ŝatas manĝi herboradikojn kaj multe detruas la stepon, kio akriĝas la dezertiigon de la kampo. Per klonado de kapro mi volas rebonigi la okcidentajn kaprojn por konservi la ekologian ekvilibron."


En Yangling bone funkcias la laboratorioj kaj sukcese iras la scienca esplorado. Bela perspektivo atendas la agrikulturon de nordokcidenta Ĉinio. ■



Feria vilaĝo



Esploro pri prevento de tritika malsano



Eksperto pri gutiga irigacio



Kaproj klonitaj



En laboratorio de ŝtupara irigacio

La historio de ŝuoj de Ĉinio (I)

- Arkeologoj supozis, ke fela piedvolvaĵo aperis en paleolitiko.
- La evoluo de "piedvolvaĵo" al "pajla sandalo" estis impeto en la historio de ŝufarado.
- Longa boto devenis de tibioŝildo aŭ krura rotangovolvaĵo.

de PANG BIAN

EN la kolorriĉa kulturo de la ĉinaj vestoj, la kulturo de ŝuoj havas sian propran sistemon. Estas interesa temo pri la deveno de ĉinaj ŝuoj el la kultura vidpunkto.

DE "PIEDVOLVAĴO" AL LEDA BOTO

Antikvuloj klasifikis vestojn en tri kategoriojn, nome la supran, malsupran kaj piedan. Pieda vesto inkluzivas ŝuojn kaj ŝtrumpojn. La antikvaj ideogramoj signifantaj ŝuojn kaj ŝtrumpojn en la ĉina lingvo havas konsistigan parton determinantan "ledon". Tio pruvas, ke en la antikveco ŝuoj kaj ŝtrumpoj havas rilatojn kun ledo. Fakte la plej primitiva ŝuo estis nenio alia ol fela ŝtrumpo, sed kompreneble ne aspektis kiel la nuna ŝtrumpo, kiu strikte konformas al la vera piedo. Precize dirite, tiam la tiel nomata pieda vesto estis nur felo volvanta la piedon. Primitivuloj detranĉis de la tuta felo pecon kaj volvis per ĝi la piedon kaj ligis ĝin per leda fadeno. Ĝi similis al farĉita kaj krispigita farunaĵo. Ĝi estis faci-

le farebla, kaj arkeologoj supozis, ke fela piedvolvaĵo aperis en paleolitiko.

Poste oni elfaris ostan kudrilon kaj sciis sekigi tendenojn kaj bati ilin en maldikajn fadenojn, ŝmiri felon per sebo aŭ vegetala oleo kaj tani ĝin ĝis moliĝo... Ĉio tio kreis kondiĉojn por kudri ledŝuojn.

La plej antikvaj ledŝuoj estis trovitaj en la antikva regno Loulan en la nordokcidento de Ĉinio, sur la piedoj de seka virina kadavro kuŝanta pli ol 4 000 jarojn en sablejo. Ili estis faritaj el ŝafledo, kaj la ŝudorso kaj plandumo estis fortike kunkudritaj per leda fadeno. La maldensaj steberoj estis klare videblaj. La teknologio estis tute malalta, tamen pruvis, ke tiam la ŝuo jam havis du partojn, nome la dorson kaj plandumon, kaj tio havis epokfaran signifon en la historio de ŝufarado de Ĉinio.

Nomadoj en la antikva Ĉinio portis sur si botojn, sed la materialoj estis malsamaj: tibetanoj faris botojn el gruntbova ledo, oroĉenoj — el kapreola ledo, heĝeoj — el fiŝa haŭto, kaj hunoj — el ŝaflana felto. Por gardi kontraŭ frosto, hunoj kovris la pie-


dojn unue per tolo, poste per felta ŝtrumpo kaj fine per leda boto.

Estis regnestro Wuling de Zhao en la Periodo de Militantaj Regnoj, kiu enkondukis ledajn botojn en centran Ĉinion. En la jaro 325 a.K., por potencigi sian regnon, li decidis altigi la militarton, t.e. anstataŭigi militĉarajn batalojn per kavaleriaj bataloj aplikataj de hunoj, anstataŭigi longajn malstriktajn robojn kaj kanabajn ŝuojn kun ligna plandumo per mallongaj jakoj kaj rajdistaj botoj. Dank' al tio Zhao fariĝis pli forta regno.


Multe disvolviĝis la tekniko de ŝufarado. Antaŭ 500-600 jaroj aperis ŝuoj kun najloj sur la plandumo. Ili estis uzataj de korteganoj kiel pluvŝuoj, sed ĉe la enirejo de la kortego oni devis demeti ilin, ĉar oni portis ilin ekster aliaj ŝuoj.

ŜNURŜUO KAJ LIGNA SANDALO

Dum loĝantoj de okcidenta Ĉinio estis farantaj ledajn botojn per osta kudrilo kaj leda fadeno, tiuj de orienta Ĉinio estis farantaj ŝnurŝuojn per bambua kudrilo kaj kanaba fadeno. Arkeolo-



Kanaba sandalo de Han-dinastio elterigita en Gansu



Ligna ŝuo de la korea nacio



Bambua sandalo de Taj-nacio

gia esploro montras, ke antaŭ 7 000 jaroj ĉinoj jam kapablis plekti ĉiutagajn uzaĵojn el vegetala fibro, kaj iuj opiniis, ke bambua kudrilo kaj kanaba fadeno aperis pli frue ol osta kudrilo kaj leda fadeno. Malgraŭ tio, la evoluo de "piedvolvaĵo" al "pajla sandalo" estis impeto en la historio de ŝufarado.

Kiel kreiĝis ŝnurŝuoj? Estis popoldiro pri tio: Iu malriĉa maljunulo vivtenis sin per vendo de kolektitaj branĉetaĵoj, kaj liaj

maizospadiko, sed nur por eksportado.

En Shandong-provinco oni faras ankaŭ fortikajn, frostrezistajn pajlajn ŝuojn kun ligna plandumo. La ligna ŝuo originis antaŭ pli ol 2 300 jaroj. Iu speco de lignaj ŝuoj havis sub si najlojn. Poeto Xie Lingyun (385-433) ŝatis montogrimpi kaj elpensis lignan ŝuon kun demetebla najlaro sur la plandumo. Por suprengrimpi, li demetis la antaŭan najlaron kaj per malsuprengrimpi, la

a.K.) oni trovis militistajn kira-sojn, inter kiuj estas leda tibioŝildo. Krome oni trovis ankaŭ senkapan jadan homon, sur kies tibio oni rimarkis postsignon de volvado. En milito la plej facile vundata korp parto estis piedo, kaj antaŭ apero de milita boto militistoj volvis siajn krurojn per ledo aŭ rotango por protekti la krurojn kaj marŝi pli facile. Tial fakuloj opiniis, ke longa boto devenis de tibioŝildo aŭ krura rotango volvaĵo.

En Houma de Shanxi-provinco oni trovis pupon de genuanta militisto antaŭ 2 000 jaroj, kaj sur la plandumoj de la pupo oni klare vidas bonordajn steblineojn, kiaj ankaŭ sur la nuntempaj. Tio montras, ke antaŭ pli ol 2 000 jaroj tola ŝuo kun stebita plandumo jam estis uzata de militistoj. La tolo estis farita ne el koton, sed el kanabo. Tiam en Ĉinio oni ne kulturis kotonon, kaj kotonon enkondukiĝis en Ĉinion malpli frue, tra la Silka Vojo. Oni stebis plandumon per kanaba fadeno por fortikigi ĝin. La falango el 8 000 terakotaj militistoj kaj militĉevaloj de Qin-dinastio (211-206 a.K.) markis la sukceson de Ĉinio en ŝufarado. La generaloj kaj kavalerianoj portis sur si ledajn botojn, dum la infanterianoj tolajn ŝuojn kun laĉo. Oni povis pli facile kuregi en laĉitaj ŝuoj. Kaj el tio oni povas scii, ke antaŭ 2 000 jaroj armeanoj jam portis ŝuojn laŭ la rangoj kaj armeaj kategorioj, kaj la ŝuoj estis faritaj de specialaj provizaj departementoj



Broditaj ŝuoj kun desegnoj de drakoj kaj feniksoj

nudaj piedoj ofte estis vunditaj de dornoj kaj pikaj ŝtonoj. Li do volvis siajn piedojn per herboj, sed herboj estis disiĝemaj kaj rompiĝemaj. Li tordis herbojn en ŝnurojn kaj volvis per ili la piedojn. Sed ŝnuroj ne estis oportunaj, kaj la maljunulo plektis ŝuojn el ŝnuroj.

Multaj herbospecoj estis taŭgaj por fari ŝnurŝuojn, do escepte de nomadoj, preskaŭ tra la tuta Ĉinio oni faris ŝnurŝuojn. La diferenco estis, ke nordanoj faris ŝnurŝuojn dikajn por rezisti kontraŭ frostoj, dum sudanoj faris malpezajn pajlajn sandalojn. Ĉu imperiestroj, ĉu vojaĝantaj literatoroj, ĉu ordinaraj kamparanoj, ĉiuj ŝatis ŝnurŝuojn. Kamparanoj en la apudmaraj lokoj de Shandong-provinco nun ankoraŭ faras ŝuojn el pajlo kaj ŝeloj de

malantaŭan. Tiamaniere li povis eviti glitfalon kaj teni la ekvilibron de la korpo.

En Xia-dinastio (22-17a jc. a.K.), antaŭ apero de ligna ŝuo oni katenis sklavojn per "ligna boto". Tio estis trabeto en longo de unu metro kaj diametro de 30 centimetroj, kun du truoj por enŝovo de la du piedoj de sklavo. La tiel nomata "ligna boto" estis tortura piedkateneno.

MILITISTA ŜUO KAJ ŜUOJ EL TOLO KAJ SILKO

En Shang-dinastio ruino (14-12a jc.



Tolŝuoj ankoraŭ uzataj nuntempe

Vere modela fil' homara!

— Funebre al Karlo Maier

de LAŬLUM

*Ho, Karlo Maier, amiko kara,
Ne simpla kuracist' centjara,
Sed plej fidela pacsoldato
Kontraŭ faŝismo la barbara.*

*Ne nure estis vi grandaĝa,
Sed batalanto lerta, saĝa.
Vi fuĝis el Hitleraj ungoj,
Ja por luktado plej kuraĝa.*

*Ne mankas tere centjaruloj,
Sed kiuj vivas kun skrupuloj
Pri la estonto de l' homgento,
Vekantoj inter somnambuloj?*

*Serenis ĉiam animo via,
Ĉar pri la tasko klarkonscia.
Senĉese pene vi strebadis
Por la progreso homsocia.*

*Vi, esperantisto plej fidela,
Pledanto por l' idealo bela,
Ĝis via lasta vivospiro
Vi restis verdstelul' modela.*

*Vi, granda amiko de Ĉinio,
Kunbatalant' sur frontlinio.
En la plej malfacilaj jaroj,
Por ni vi plenis je simpatio.*



La aŭtoro (maldekstre) kun geedzoj Maier

*Vi kun l' edzino milda Eva
Migradis kiel paro meva,
Tra la terglobo, spit' al ŝtormoj,
Kun bela song' en koro reva.*

*Vi ĝojis falon de Hitlero,
Jubilis pro la pacprospero,
Suspiris pro subir' ruĝstela,
Neniam senis je espero.*

*Vi, granda amiko de Ĉinio,
Helpadis al EPC-redakcio,
Ja ĝis la lasta vivospiro
Flamadis via simpatio.*

*Ho, Karlo Maier, amiko kara,
Ne simpla grandaĝul' centjara,
Sed plej fidela pacsoldato
Vere modela fil' homara!*

laŭ fiksita normo.

En Qing-dinastio (1644-1911) militistoj uzis glitŝuojn, similajn al la nunaj sketbotoj. La ŝuo havis sur sia leda plandumo unu aŭ du ferajn stangetojn. Militistoj povis fluge glitkuri en tiaj ŝuoj. La imperiestra familio de Qing-dinastio devenis de manĉuroj, kiuj vivis en frosta nordoriento de Ĉinio, tial glitkurado sur glacio estis unu el la militaj ekzercoj en vitro. La tradicio estis konservata ĝis post kiam la regantoj prenis Pekinon kiel ĉefurbon, kaj la ekzerco iom post iom evoluis en distriĝon en kaj ekster la palaco.

Jam antaŭ 4 000-5 000 ja-

roj ĉinoj komencis bredi silk-raŭpojn, kaj antaŭ pli ol 3 000 jaroj ili povis teksu tre fajnan ŝtofon kun algebraj desegnoj kaj tinkturi la ŝtofon per ekstraktaĵoj de ercoj kaj vegetaloj. Tio multe karakterizis la stilojn de la ŝuoj de Ĉinio, ke ili fariĝis pli belaj. Kaj de tiam aristokratoj portis multkolorajn silkajn ŝuojn anstataŭ ŝnuraj.

Historia materialo notis: "Nun aperis granda hontindaĵo, ke metiistoj devas fari ŝuojn por la edzinoj de la imperiestro." La registrinto opiniis, ke antaŭe virinoj mem faris ŝuojn, sed nun la ŝuoj de la edzinoj de la imperi-

estro estas faritaj de metiistoj, kio estas granda hontindaĵo. En Qi-regno en la Periodo de Militantaj Regnoj oni multe akcentis lertecon de virinoj en kudrado, kaj ĉiuj virinoj estis lertaj en teksado kaj ŝufarado. Por ke la silkaj ŝuoj estu pli belaj, virinoj de Qi-regno brodis sur la ŝuoj belajn desegnojn aŭ ornamis la ŝuojn per oraĵo, arĝentaĵo aŭ diversaj gemoj. Tiam estis furoro, ke korteganoj portis ege luk-sajn perlajn ŝuojn. Sed iom post iom ankaŭ knabinoj de malriĉuloj portis broditajn silkajn ŝuojn por sin dungi al riĉuloj kiel servistinoj aŭ fariĝi kromedzinoj. ■

LA CENTA DATREVENO DE MALKOVRO DE LA SUTROKONSERVA KAVERNO DE DUNHUANG


Mogao-kavernaro de Dunhuang, ekkonstruita en la jaro 366, havas pli ol 700 kavernojn. Dum jarcentoj ĝi estis nekonata de la publiko, sed en la lasta jarcento

ritiloj. Tiuj valoraj objektoj estis faritaj en pli ol 700 jaroj inter la Orienta Jin-dinastio (317-420) kaj la Norda Song-dinastio (960-1127). Tio ja estas historiaj objektoj de la sutrokonserva kaverna, kiu poste fariĝis mondfama. El ili la plej grandnombraj kaj altvaloraj estas klasikaj dokumentoj, nomataj de la akademiano rondo "dokumentoj de Dunhuang", kies enhavo koncernas astronomion, almanakon, medicinon, his-

unu post alia al Dunhuang britaj, francaj, japanaj kaj rusaj ekspedicioj, kiuj diversmaniere forportis multe da valoraj objektoj de Dunhuang. Tiuj objektoj nun estas en konservaj establoj kaj ĉe individuoj de Britio, Francio, Japanio kaj Rusio kaj nur tre malmulte estas en Ĉinio.

La riĉa enhavo kaj alta valoro de la historiaj objektoj en la kaverna estas alte taksataj ne nur de la ĉinaj fakuloj, sed ankaŭ de alilandaj specialistoj, kiuj post nelonge sin dediĉis al la esplorado. Kaj en la 20-a jc. naskiĝis nova scienco — dunhuangologio, kiu estas famega en la kampo de sociaj sciencoj.

Memore al la centa datreveno de malkovro de la kaverna, okazis la Ekspozicio de Dunhuang-arto en Pekino kaj samtempe simpozioj cele manifesti kaj resumi la esplorajn fruktojn en dunhuangologio de la 20-a jc. kaj diskuti pri la tendenco de ĝia disvolviĝo en la 21-a jc., koncernaj problemoj kaj ilia solvo.



En la sutrokonserva kaverna en Dunhuang

ĝi fariĝis alte taksata de la fakuloj kaj turistoj ĉinaj kaj alilandaj, ĉar antaŭ 100 jaroj oni faris mondfaman malkovron de la sutrokonserva kaverna en Dunhuang.

Somere de 1900 Wang Yuanlu kaj aliaj taoistoj de la antikva templo Mogao hazarde malkovris valoran kavernon dum forigado de la sablo ĉe la kaverna n-ro 16. Ili malfermis la pordon blokitan de tero kaj trovis, ke en la kaverna konserviĝas ĉ.50 mil volumoj da antikvaj dokumentoj publikaj kaj privataj, centoj da ruloj da silkaj pentraĵoj kaj iuj religiaj

torion, geologion, politikon, ekonomion, militajn aferojn, diplomation, religiojn, socion, morojn, naciojn, filozofion, logikon, sutrojn, literaturon, dramojn, lingvojn, ideogramojn, muzikon, dancojn, pikturon, kaligrafion, tradukon k.a. Tie estas ankaŭ multe da antikvaj ideogramoj de ĉinaj nacioj, perditaj dum longe. Tio multe kontribuis al la ĉina kultura trezorejo.

Bedaŭrinde, pro putriĝo kaj malkapablo de la Qing-dinastia registaro kaj invado de okcidentaj potencoj, nelonge post malkovro de la historiaj objektoj venis

HUANGSHAN DISVOLVIĜAS EN MODERNAN TURISMAN URBON

Huangshan, fama ĉina turisma urbo, situas en la suda parto de Anhui-provinco. Ĝia pitoreskejo estis enlistigita en la Mondajn Kulturajn kaj Naturajn Heredaĵojn en 1990 kaj post 9 jaroj ricevis internacian honoran mencion de Unesko.

Kiel turisma urbo, Huangshan havas tre belajn naturajn pejzaĝojn. Krom tio ĝi estas ankaŭ urbo kun historio de pli ol 2 300 jaroj. Tie naskiĝis la Huizhou-a kultura sistemo kun komerco, opero, gastronomio kaj arkitekturo kaj aperis multe da historiaj famu-

loj. Nun la Huizhou-a kulturo estas atentata ne nur de ĉinaj, sed ankaŭ de alilandaj fakuloj por esplorado.

Nun en la urbo estas pli ol 4 900 historiaj restaĵoj, el kiuj 45 estas rigardataj kiel ĉefe protektataj de la ŝtato kaj provinco. Tie estas la fama historia urbo She-xian, antikvaj loĝdomoj en Yi-xian-gubernio, antikva strato de Tunxi, kiuj estas honorataj de ĉinaj kaj alilandaj fakuloj kiel muzeo de la kultura historio de Ming-kaj Qing-dinastioj. Kaj krom tio, Huangshan produktas faman teon, Hui-an tuĉbastoneton kaj She-an inkfrotujon.

Por komplete konformigi sin al la bezonoj de la internaciaj turismaj urboj, Huangshan plirapidigas siajn paŝojn en konstruado kaj perfektigado de fundamentaj instalaĵoj, kiaj flughaveno kaj hoteloj. Post nelonge Huangshan servos per plezurvojaĝa turismo, kultura turismo kaj feria turismo, kiuj kune formas Huangshan-merkaton.

UFO EN LA OKULOJ DE SCIENCISTOJ

En la lastaj jaroj en iuj ĉinaj urboj oni diris, ke ili propraokule vidis la tiel nomatan UFO. Kvankam multaj kun intereso diskutis pri tio, tamen sciencistoj neis ĝian ekziston.

Astronomoj opiniis, ke kvankam en la senlima kosmo eble ekzistas multe evoluinta civilizacio ekster la terglobo, tamen en la kelkmiljara homa civilizacio la ekstertergloba civilizacio neniam vizitis la terglobon. Inter la terglobo kaj la stelo, plej proksima al la suna sistemo, estas distanco de 4.3 lumjaroj. Por atingi la sunon, oni devas veturi de la stelo dekmilojn da jaroj eĉ per la plej rapida spacoŝipo. Ĉu ekzistas tiel grandaĝa ekstertergloba estaĵo? Ĉu ekzistas sufiĉe da

brulaĵoj? Kun tiu supozo oni opinias, ke almenaŭ ĝis hodiaŭ UFO ne povas atingi la terglobon.

La raporto pri UFO aperis unuafoje en la 19-a jc. En la 20-a jc. oni raportis pri tio dekmilojn da fojoj en la monda skalo. Oni poste konstatis, ke ĉiuj tiuj eventoj rezultis de la homa agado aŭ atmosfera moviĝo super la terglobo. Kompreneble, povus esti la tiel nomataj UFO, kiuj ne estis pruvitaj, tamen ili ne rezultis de

vizito de "aliplaneda homo" al la terglobo.

Astronomoj diris, ke UFO, kiu dufoje aperis super Ŝanhajo, estis kaŭzita de aviadiloj flugantaj pli ol dekmil metrojn super la tersurfaco, kion atestis la vidintoj, tamen ne sciante, ĉu tio estis aviadilo civila aŭ milita, ĉu ĉina aŭ alilanda. Respondeculo de la Civila Aviada Administracio de Ŝanhajo diris, ke estas ebleco, ke tion kaŭzis regula flugado de aviadilo.



Huangshan-monto

Derungoj en profunda montaro

En la loko de derungoj neĝo ekfalas novembre. Oni interkomunikas kun la ekstera mondo per telefono. Sed telefona drato facile rompiĝas sub la pezo de neĝo, kaj la loko fariĝas tute izolita de la ekstera mondo.

de SHEN WEN

DERUNG estas mistera naci-malplimulto de Ĉinio, ĉar plejparto de la nacioj vivas en profundaj montar-oj ambaŭflanke de Derung-rivero en Yunnan-provinco, izolite de la ekstera mondo. Homoj ekster la montar-oj ne povas facile eniri en ilian loĝlokon, kaj en vintro la eniro fariĝas multe pli malfacila.

LONGA FERMITECO DE MONTARO

En la loko de derungoj neĝo ekfalas novembre, kaj la valoj fariĝas netraireblaj. Oni interkomunikas kun la ekstera mondo per telefono. Sed telefona drato facile rompiĝas sub la pezo de neĝo, kaj la loko fariĝas tute izolita de la ekstera mondo. Kaj tia stato daŭras ĝis la venonta aŭgusto. Pro tio la 4 000 nacioj en la profundaj montar-oj havas, krom la kutimaj festoj, ankaŭ la propran "Feston de Montomalfermiĝo". Kiam degelas la neĝo, la unua karavano venas al Gongshan, la sidejo de la Derung-kaj Nu-nacia Aŭtonoma

Gubernio, kunportante poŝtaĵojn neekspeditajn dum 8 monatoj, salon, ŝtofon, tabakon, vinon k.a., kaj la montanoj huraas pro la reku-niĝo kun la ekstera mondo.

En Gongshan estas nur unu strato en longo de 200 metroj. La urbeto konsistas el malmultaj

oficejoj kaj popolaj domoj starantaj sur montodeklivo okcidente de la rivero. Kaj la kampoj sur la transa montodeklivo estas tinkturitaj de ruĝa poligono kaj flava maizo, dum ambaŭ bordoj estas dekoritaj de diversaj sovaĝaj floroj kaj verdaĵoj.

Aŭgusto estas ĉefmonato de transportado, kaj la strato estas plenplena de karavanoj el diversaj lokoj. La karavananoj ripozas kaj starigas fornon tuj ĉe la strato por kuiri manĝaĵojn. Ili alte stakigas la selojn apud si. Ili devas kapti ĉiun horon por enporti necesajojn de la montanoj en la 4 monatoj antaŭ la fermiĝo de la montaro.

PENDPONTO KAJ GLITKABLO

La meznombra larĝo de Derung-rivero estas 40 metroj kaj vilaĝoj troviĝas sur ambaŭ bordoj de la rivero. Tie estas popoldiro: "Oni aŭdas unu alian trans la rivero, sed por renkontiĝi bezonas iri tri tagojn." Tie la riverlito estas krute dekliva, la fluo torenta, la



Glitkablo super Derung-rivero

diferenco de akvoniveleoj granda, la fundo de la rivero danĝera pro multe da rifoĵoj. Tial la loko ne havas pramejon, kaj oni uzas nur multajn pontojn.

2 kilometrojn for de Gongshan estas pendoponto 60-metra, farita el maldikaj bambustangoj ligitaj kaj du ŝtalaj kabloj. Kiam oni iras sur la ponto, ĝi balanciĝas kiel pendolo. Ju pli proksime oni venas al la mezo de la ponto, des pli forte ĝi balanciĝas. Sub la ponto muĝas torento, sed derungoj povas facile kaj rapide iri sur ĝi malgraŭ peza korbo sur la dorso. Eĉ en malluma nokto ili kuraĝas trairi la ponton malgraŭ ĝia balanciĝo kaj terura muĝo de la torento.

Alia instrumento de rivertransiro estas glitkabloj kruta kaj horizontala. La horizontala fakte estas ŝnurego tordita el bambuaj strioj. La river-transirantoj kroĉiĝas sub la kablo per kvar membroj kaj malrapide sin movas al la transa bordo. La kruta estas ŝtala ŝnurego, kies du ekstremoj estas fiksitaj sur krutaĵoj de ambaŭ bordoj de la rivero. Per glittabulo aŭ glitrado oni fluge glitas al la transa bordo.

MOROJ DE DERUNGOJ

Derungaj viroj ne tatuas sin, sed la knabinoj tion faras en la aĝo de 12-13 jaroj. Per bambua pikilo kun fulgo oni faras desegnojn sur glabelo, nazradiko kaj vangoj kaj ĉirkaŭ la lipoj. Poste oni faras pikadon per pinglo sur la linioj de la desegnoj, forviŝante sangon je ĉiu piko, kaj ŝmiras la desegnojn per fulgo. Post 3-5 tagoj la desegnoj fariĝas nigre bluaj kaj neniam forigeblaj. La virinoj tatuas sin laŭ sia prefero. Iuj tatuas nur sian mentonon, kaj la desegno similas al barbo. Aliaj ŝatas plenan tatuon sur la tuta vizaĝo. La desegnoj estas tre diversaj.

Iuj diras, ke tatuado de virino simbolas belecon, aliaj kredas, ke tatuado gardas kontraŭ sorĉo, kaj

trij opinias, ke tatuado estas temo de la familio aŭ de la tuta nacio. Sed nun knabinoj ne tatuas sian vizaĝon, kaj la virinoj kun tatuata vizaĝo aĝas almenaŭ 30 jarojn.

Derungoj havas multajn eksterordinarajn kutimojn, ekzemple sepultado estas helpata de la tuta vilaĝo. Oni kurbigas la membrojn de la mortinto, flankekuŝigis ĉi tiun en ligna ĉerko kaj enterigas ĝin sen meti teramason, sed starigas stangon kaj pendigas sur ĝi arbaleston, sagujon, felton aŭ alian uzaĵon de la mortinto. Neniu tuŝas la pendaĵon, ĝis ĝi veterde-truiĝas.

Irante laŭlonge de Derungrivero, oni povas vidi stakojn kaj stakojn da branĉetaĵoj kaj herboj

kunportaĵon apud la vojo kaj signi per ŝtono, kaj li certe reakiros la objekton revenvoje. Se oni malsatas survoje, li povas manĝi maizon aŭ bataton en kampo apud la vojo, kaj post la manĝo li metas krucitajn bambuajn platetojn por esprimi, ke li ne estas ŝtelisto, kaj la mastro de la kampo ne kulpigos lin.

Post riĉa rikolto kaj en festotagoj derungoj trinkas rizvinon el granda poto kaj dancas nacian dancon en akompano de antikvaj derungaj kantoj. Ili tre ŝatas kanti dum vin-trinkado. Tion preferas kaj la viroj kaj la virinoj.

La plej solena festo de derungoj estas la Novjara Festo. En la festo ili oferas bovon al Dio. La derungoj jam ne vivas vivon de



Derung-aj virinoj

kolektitaj sur monto aŭ elprenitaj el la rivero, kaj sur la supro de la stakoj premas ŝtono. Tio montras, ke ili havas posedantojn, kaj neniu tuŝos ilin. Se iu vojaĝanto sentas sian kunportaĵon tro peza, li povas pendigi ĝin sur arbo, alligi al ĝi herbon aŭ meti la

primitivuloj, sed ankoraŭ ŝatas porti naci-stilan felton oblikve sur la ŝultro. La viroj nudigas la maldekstran ŝultron kaj portas arbaleston, sagujon kaj sabron, kaj la virinoj nudigas la dekstran ŝultron kaj ornamas sin per kelke da kolĉenoj el bidoj. ■

La lasta milita elefanto

(Novelo)

Preskaŭ en ĉiu elefanta tombo oni povas trovi dekojn da dentegoj, kaj elefanta tombo estas fakte granda trezorujo. Ŝajne la elefantoj travidas la koron de la homoj avidaj je iliaj fortaj incizivoj kaj prenas kiel sian tombon la lokon malfacile atingeblan en profunda primitiva arbaro.

de SHEN SHIXI

LA primitiva arbaro en Xi-shuangbanna de Yunnan-provinco en la sudokcidento de Ĉinio estas hejmo de elefantoj. En militaj jaroj tie estis brava trupo el elefantoj.

Foje en kontraŭagresa batalo en 1943 la militaj elefantoj kuraĝe batalis tondre muĝante kaj peze batis la malamikojn, sed bedaŭrinde ĉiuj elefantoj estis trafitaj de kuglo de malamikoj. Post la batalo oni fosis grandan kavon en longo kaj larĝo de pli ol 20 metroj por enterigi la mortintajn elefantojn kaj starigis antaŭ la tombo steleon kun skribo "Cent-elefanta Tombo".

Dum transportado de la mortintaj elefantoj oni rimarkis, ke unu virelefanto estas spiretanta, kaj ĝiaj kolo kaj piedo estis grave vunditaj. Per ĉaro kun 8 ĉevaloj oni portis la elefanton en vilaĝon. Ĝi estis la unusola elefanto transvivinta la batalon, kaj ĝia nomo estis Gaaso.

Marte de 1969 mi transloĝiĝis en la vilaĝon kaj vidis Gaason. Ĝi aĝis jam pli ol 50 jarojn. La kolo estis forte oblikva kaj la buŝo neniam fermebla. La vundita piedo ŝajne estis malpli longa ol la aliaj, kaj ĝi iris lame. Ĝi preskaŭ ne havis harojn, kaj la du dentegoj estis tegitaj de dika tavolo da flava substanco. Tamen ĝi estis milita elefanto, meritoplana bata-

lanto. La vilaĝanoj respektis ĝin kaj neniam laborigis ĝin. Ĝi vagadis en la vilaĝo, kaj la vilaĝanoj donis al ĝi jen bananojn jen akvon.

Mi konatiĝis kun maljuna vilaĝano Bonondino, kiu prizorgadis la elefanton. Kaj sekve mi amikiĝis kun Gaaso.

Tri jarojn post mia alveno al la vilaĝo, Gaaso fariĝis pli kaj pli kaduka kaj ĝia apetito pli kaj pli malbona. Ĝi dormis sub arbo tra la tuta tago. Bonondino bone sciis la elefanton kaj diris al mi: "La suno subiros, la fajro estingiĝos, kaj Gaaso foriros." Post kelke da tagoj Gaaso rifuzis manĝi kaj kuŝiĝis. Mi longe skuis ĝian rostron kaj ĝi malfacile malfermetis la okulojn kaj ekrigardis min. Mi pensis, ke ĝi troviĝis en duonsveno.

Iun matenon, kiam mi preterpasis la ŝedon de Gaaso apud la draŝejo, mi miris, ke Gaaso subite rekonsciiĝis kaj troviĝis en ekscitiĝo. Ĝiaj okuloj estis ruĝaj, kaj vidinte Bonondinon, ĝi tuj kriis mallaŭte kaj direktis sian rostron al la subtegmento de la ŝedo, kie amasiĝis diversaj objektoj. Ĝi ekscitite piedbatis la teron. Bonondino neglektis ĝin, kaj ĝi koleriĝis kaj frapegis per sia rostro la foston de la ŝedo kaj sin puŝis kontraŭ la tabula muro de la ŝedo. La ŝedo preskaŭ falis. Bonondino ne povis kvietigi ĝin kaj petis min iri supren kaj transpasi al li la objektojn en la sub-

tegmento por vidi, kion la elefanto volas.

En la subtegmento estis duonkorbo da rizosemoj, du faskoj da maizospikoj kaj kelke da jutsakoj. Mi pensis, ke ĝi iom resaniĝis kaj volis manĝi, kaj mi ĵetis al ĝi la du faskojn da maizospikoj. Sed ĝi prenis kaj elĵetis ilin el la ŝedo. Mi do pasigis al Bonondino la korbon, sed antaŭ ol li prenis ĝin, Gaaso faligis ĝin kaj tretadis ĝin en kolero. Mi ĵetis al ĝi la jutsakojn, kaj ĝi disŝiris ilin per la dentegoj.

Do en la subtegmento restis nenio alia krom malnova bambumato. Sed Gaaso ankoraŭ muĝadis rigardante min. "Pli serĉu, kio alia tie restas," min urĝis Bonondino. Mi levis la maton kaj vidis ion similan al selo, grandan kaj pezan, ŝajne el ledo de sovaĝa bovo, kaj kovritan de dika tavolo da polvo. Mi piedbatis ĝin malsupren kaj je tio miraklo okazis: Vidante la aĵon, Gaaso tuj kvietigis, forblovis la polvon kaj longe karesis ĝin per sia rostro. Ĝiaj okuloj splendis, kvazaŭ renkontante malnovan amikon.

"Ho, ĝi volas la selon," iluminigis Bonondino. "Tio estis uzata dum la batalo. Kiam ni reportis ĝin de la batalkampo, ĝi havis sur si la selon. Por kuraci ĝiajn vundojn, ni demetis la selon kaj ŝovis ĝin en la subtegmento. Pasis jam 26 jaroj, kaj mi antaŭ longe forgesis la aĵon, sed

Gaaso bone memoras ĝin.”

Gaaso prenis la selon per sia rostro, metis ĝin sur sian dorson kaj signis al ni, ke ni ligu ĝin. Post granda peno ni sukcesis fiksi la selon.

La selo havis sur si truojn de kuglo, ŝajne ankaŭ sangajn makulojn. Krome ĝi odoris strangan miksan odoron el ledto, polvo kaj sango. Meze de la selo estis kuseno en formo de lotusfloro, garnita per arĝentaj tintiletoj kaj abrikotkoloraj kvastoj. Kvankam malnova, ĝi aspektis impone. Kun la selo sur la dorso, Gaaso aspektis brave.

“Kial ĝi volas surhavi la selon?” mi mire demandis.

“Ŝajne tio ne estas bona aŭguro,” diris Bonondino, kuntirante la brovojn en melankolio. “Mi pensas, ke ĝi foriros de ni al la elefanta tombo.”


Mi aŭdis pri elefanto. Ĝi estas saĝa besto kaj povas antaŭsenti sian morton, krom se ĝi estas trafita de violenta morto. Ĉirkaŭ duonmonaton antaŭ sia morto, elefanto forlasas la kamaradojn kaj iras sola al la mistera elefanta tombo en malproksima loko. Ĉiu grego havas sian difinitan tombon. Tio estas aŭ profunda fendo pro eflorskado, aŭ granda karsta kaverno, aŭ enfalinta kavo pro tertremo. Ĉiu membro de la grego iras al la sama tombo, malgraŭ kien ajn ĝi migris. Pli mirinde estas, ke elefanto ĉiam povas trafte trovi, pere de mistera forto, la tombon de sia grego, eĉ se ĝi neniam vidis la tombon.

Ĝusta estis la supozo de Bonondino: Gaaso estis forlasonta la vilaĝon por iri al sia eterna

ripozejo. Ĝi ĉirkaŭiris la vilaĝon trifoje por esprimi sian dankon al la vilaĝanoj, kiuj savis ĝin kaj vivtenis ĝin dum 26 jaroj. La vilaĝestro ligis al ĝia kolo blankan tukon el gazo kaj ĉirkaŭvolvis ĝiajn kvar piedojn per nigra ŝtofo. La vilaĝanoj junaj kaj maljunaj prezentis al ĝi bananojn, sukerojn kaj rizbulojn, sed ĝi nur trinkis iom da akvo.

La suno subiris, la ĉielo grizigis, kaj Gaaso adiaŭis la plorsingultantajn vilaĝanojn.

Disiĝis la homoj, kaj Bonondino gape rigardis en la direkto de foriro de la elefanto. Li diris al mi: “Ni sekvu ĝin kaj trovu la tombon...”



Mi komprenis, ke li volas akiri elefantajn dentegojn kune kun mi kiel kompano. Korpo de mortinta elefanto facile putras en tropika pluvarbaro, sed la dentegoj ĉiam brilas per alloga koloro. Preskaŭ en ĉiu elefanta tombo oni povas trovi dekojn da dentegoj, kaj elefanta tombo estas fakte granda trezorujo. Ŝajne la elefantoj travidas la koron de la homoj avidaj je iliaj fortaj incizivoj kaj prenas kiel sian tombon la lokon malfacile atingeblan en profunda primitiva arbaro.

Bonondino divenis mian heziton kaj diris: “Ni prenu dentegojn de aliaj elefantoj, sed ne tiujn de Gaaso, kaj tiel ni ne rimorsos antaŭ Gaaso.”

Mi aprobis lian ideon havi elefantajn dentegojn sen riski ofendon al Gaaso.

Ni ekiris kaj post nelonge kuratingis Gaason, kiu solece sin trenis sur mallarĝa vojo kondukanta profunden en montaron. Mallumiĝis, kaj la blanka tuko en signo de funebro sur ĝia kolo fariĝis celo de nia observo. Gaaso iris malrapide pro lameco, sed ne haltis, kaj en la sekvanta mateno ĝi atingis Daluo-riveron.

“Mi rememoras, ke antaŭ 26 jaroj ni elakvigis Gaason ĉi tie,” Bonondino diris, montrante testudforman rifon en la rivero. “Dank’ al tiu rifo Gaaso estis haltigita en torento, alie la torento forportus ĝin kaj ĝi certe dronus.”

Do ĉi tie estis la batalkampo antaŭ 26 jaroj!

Gaaso vadis en la rivero kaj venis al la rifo. Ĝi karesadis per sia rostro la krudan rustkoloran rifon. Post longe ĝi levis la kapon kaj surdige muĝis al la leviĝanta suno ĉe la horizonto. Ĝi fariĝis tute aliaspekta, ĝia korpo pufiĝis kvazaŭ

enblovita per aero, la haŭto de ĝiaj kvar piedoj estis streĉita kaj la okuloj radiis per vigleco. La muĝado fariĝis impone trista, kaj fiŝoj terurite elsaltis el la akvo.

Leviĝis ĉe ni respekto: Ĝi estas elefanto, sed antaŭ sia morto ne forgesis la teron, sur kiu ĝi batalis sangoverŝe.

Ni sekvis ĝin ĉ. unu horon kaj ĝi subite haltis sur milda sunflanka montodeklivo.

“Jes, ĉi tie estas tombo de la pli ol 80 elefantoj kaj tie estas steleo,” Bonondino diris mallaŭte.

Aŭtuna mateno


KAMARADOJ! Ĉu vi rigardis kampon en aŭtuna mateno? Kia ĝi estas?

Nebulo musline sterniĝas super la tero, vualante la orkoloran kampon, pezajn spikojn, proksimajn kaj malproksimajn vilaĝojn. Nuboj antaŭ ni kiel silkaj rubandoj ŝvebas en arbaroj, super kampoj. Ŝajne la mondo estas iluzia.

Spiru la freŝan aeron, malvarmetan kaj malseketan. Ĉu vi rimarkis, ke ĝi diferencas de tiu en la urboj? Enspiru, kiom vi volas.

Antaŭ sunleviĝo en la oriento la griza firmamento iom post

iom ruĝiĝis. Nuboj ligiĝis kaj interkovriĝis unuj post aliaj kiel amaso da ŝafoj paŝtataj sur kotonaj kampoj, forteguloj luktantaj kaj feinoj dancantaj. Momen-



ton poste, sunradioj ekbrilis tra fendoj de la nuboj kaj ruĝigis la

teron.

Leviĝis la suno. Unue aperis ruĝaj linioj, kiuj post nelonge ŝanĝiĝis en duonan oranĝon. Post momento ĝi ŝanĝiĝis en gigantan ruĝan balonon, kiu kviete apogis sin sur la tero.

Momenton poste la sunradioj dense sterniĝis sur la teron tra la matenaj nuboj kaj arbaroj. Traktoroj ekfunkciis kaj kamparanoj arope ekkulturis.

Karaj kamaradoj, ĉu vin interesas la bela felando? Jen ĝi estas ĉe ni! Ĝi ja estas dotita de la

naturu, tamen elspiras nian penadon. ■

Mi rigardis en la direkto de lia fingromontro kaj vidis steleon en herbaro, kaj sur la steleo estis apenaŭ legebla skribo "Centelefanta Tombo".

Ĉu Gaaso volis...? Mi ne kuraĝis supozi, ĵetis rigardon al Bonondino kaj trovis, ke ankaŭ li kuntiris la brovojn pro konfuziĝo.

Gaaso venis al la steleo, haltis sur ebena terpeco plena de herboj kaj ekfosis per la du dentegoj. Ĝi fosis de mateno ĝis posttagmezo kaj sukcesis fari malprofundan ovalan kavon. Ĝi glitis en la kavon kaj daŭrigis fosadon elĵetante teron per la rostro. Ni rigardis ĝin de malproksime kaj vidis, ke ĝia korpo malleviĝis colo post colo. La suno subiris kaj la luno leviĝis, sed ĝi ankoraŭ daŭri-

gis la fosadon.

En noktomezo ni jam ne povis vidi Gaason kaj nur aŭdis mallaŭtan sonon de ĝia fosado, kaj la elĵetado de tero fariĝis pli kaj pli malrapida. Post la unua kokeriko regis silento.

Kun granda pacienco mi kaj Bonondino atendis tagiĝon kaj nur tiam ni havis la kuraĝon iri al la kavado por esplori. La kavado profundis 3 metrojn. Gaaso kuŝis en la fundo kun kapo turnita flanken kaj rostro spirale ĉe genuo. Unu okulo nefermita rigardis al la ĉielo.

Gaaso mortis. Ĝi ne iris al la malproksima mistera tomo de siaj prapatroj. Ĝi fosis kavon apud la "Centelefanta Tombo" kaj eterne ripozis kune kun siaj kunbatalantoj. Ĝi trovis indan lokon por veterana milita elefanto.

La kavado odoris putran odoron, kaj ni povis vidi la skeletojn de elefantoj entombigitaj antaŭ 26 jaroj. En la ruĝa tero ŝajne vidiĝis blankaj elefantaj dentegoj. La dentegoj de Gaaso fariĝis brilaj pro frotado kun tero dum la fosado. En la matena lumo la dentegoj brilis per digna rebrilo. Bonondino diris en honto: "Se ni forprenos ĉi tiujn dentegojn, nian novan domon trafos incendio kaj nian bovon mortigos tigro!"

"Jes, nin trafos fatalo!" mi diris. Rigardante la dignan korpon de Gaaso, ni sentis nian animon turpa.

Mi kaj Bonondino kune replenigis la kavon per la tero elĵetita de Gaaso kaj firmatis ĝin... ■

Elĉinigita de
WANG SHIRONG



Aprecado de umefloroj



La ebura skulptaĵo “Aprecado de umefloroj” montras palacajn virinojn sin amuzantajn sub umearboj en ĝardeno. Ĝi estas unu el la 12 eburaĵoj pri la vivo de virinoj en granda domo. Ĝi estas la unua, montranta la amuzan scenon en la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro. La eleganta skulptaĵo

estis finfarita de Chen Zuzhang en 1730, kiam regis Qing-dinastia imperiestro Yongzheng. Ĝi, alta je 39.1 cm., larĝa je 32.9 cm. kaj dika je 3.2 cm., surhavas poemon de imperiestro Qianlong, filo de Yongzheng. Ĝi estas konservata en la Muzeo de Imperiestra Palaco en Pekino.



La Okcidenta Lago en Hangzhou

Foto de BAI BIANHUA

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》二〇〇〇年第十期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2